



Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista

Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20 FF

Giri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto:

**Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT**

\*\*\*\*\*

## KRIMOJ

La aktualeco terure rapidas.

Ĉu estas jam tro malfrue por paroli pri tiu sudkorea aerŝipo, kiu pereis en Pacifiko kun 269 personoj ?

Oni diris : abomeninda krimo. Prave, ja certe.

Cetere, ĉiu murdo, ĉu multopa ĉu unuopa, estas krimo.

Sed de kies kulpo ?

Kulpas, je la unua grado, la pafinto, kiu detruis tiujn homajn vivojn. Kiel la SS-soldatoj en Oradur; kiel la atombombistoj de Hiroŝimo kaj Nagasako; kiel la torturistoj kaj murdistoj en Aŭŝvico; kiel la bombaviadistoj de Hamburgo kaj Dreseno. Kiel multaj aliaj, kiuj ne havis la senkulpigon defendi sian propran vivon fronte al kontraŭstarantaj "malamikaj" murdistoj. Multajn ekzemplojn mi konis dum mia longa ekzistado, sennombraj estus menciendaj dum la tuta homara historio.

Miaopinie ĉiuj tiuj krimuloj estis same kulpaj. Ilia krimo estas la krimo obei, kiel diris Han Riner, ĉu ili obeis al preciza ordono de grada

superulo, ĉu al ĝenerala instrukcio.

Ĝi estas la krimo de la militista disciplino.

Oni prave diras : armeo, lernejo de krimo.  
Valo.

\*\*\*\*\*

### Pri "JULIA" kaj "LAŬTE!"

Depost la apero de L! 50 plu alvenis monkontribuoj por la pagado

de JULIA. Plej varman dankon al ĉiuj gemalavaruloj ! Jen la listo:  
C.P. 50, F.M. 200, D.B. 100, R.P. 200, J.vH. 100,  
J.A. 50, G.M. 50, A.M. 100, Anonimulino 100, C.L.62,50,  
R.D. 100, S.C. 100, R.L. 200, G.C. 100, N.M. 50

Nuna listo : 1562,50 + 8665 (1a listo), sume : 10227,50F

(La kolektado plu daŭras!!)


Ni aĉetis kvaran literaron. Specimeno troviĝas minuskle sur la frontpaĝo kaj majuskle en la bulteno mem. Sed, ho, angoro! JULIA dufoje malsaniĝis : totala paneo, verŝajne kaŭzita de subita alveno de kromaj voltoj en delikataj tagaj momentoj. Ni de tiam uzas tensi-regulilon, ĉu ĝusta la diagnozo ?

La okuloj de pluraj legantoj preferas la dikajn literojn. La etaj litertipoj ŝparigas paĝojn, kiam la bulteno riskus fariĝi iom pli ol 36-paĝa (t.e. 50-grama). Kiam ne estos tiu risko, aŭ se la numero ĉiel najbaros al 100 gramoj, tiam JULIA uzos pli da dikaj literoj. Ni respektu ĉies okulojn...sen tro damaĝi la kason.

La ĝis nun uzita ofsetpapero aspektas iom tro travidebla. Nun, kaj kvankam tio kostos iomete pli, ni uzas paperon por mimeografado. Nuraj zorgetoj : la inko, pli bone sorbita, aspektas griza, kaj ĉar tiu papero ne estas glacea, povas okazi samtempa enŝoviĝo de pluraj folioj en la ofsetilon, kio riskas perturbi ĝin, aŭ almenaŭ lasi virgaj foliflankojn. Kiu neniam purigis la inkumitajn cilindrojn, en kiuj dispeciĝis paperaĉo, tiu ne scias pri kiu "ĝuo" temas !

Abonantoj de L! kaj legemuloj de SAT-Broŝurservo ! Bonvolu aparte atenti la lastan paĝon de tiu ĉi n-ro, kiu informas vin pri la eventuala fino de via abono kaj la stato de via konto ĉe la bs. Ni konfesas, ke la nombro da broŝurabonantoj estas mizera, alarmoveka. La venontaj broŝuroj estos certe pli belaspektaj ol la ĝisnunaj. La enhavo estas ĉiam interesa kaj instrua (vd. la informojn pri SAT-Broŝurservo fine de tiu ĉi n-ro). Bonvenon do al la gelegemuloj, kiuj profitos de la jarfino por mendi broŝurojn aŭ fariĝi broŝurfideluloj ! Ha, se ĉiuj gelaŭtuloj estus ankaŭ broŝurlegantoj!! Sed ni ne revu!

Kribo



## soleco... emo al soleco...

**BGD :**

La soleculo devas esti konsiderata laŭ du malsamaj vidpunktoj : la civitana kaj la individua (aŭ apartula). Kiel civitano li estas devigata obei la leĝon de la kolektivo, al kiu li denaske apartenas aŭ kiun li elektas, ĉar ekster la kolektivo, almenaŭ en nia tutmonda socio, soleca vivo ne eblas. (Ekster la eklezio ne estas savo). Kiel apartulo li libere obeas sian propran pensmanieron, fontintan el liaj propraj kapabloj kaj spertado. Konsekvence, estas normale, ke la apartulo sentas sin ĝenata pro la deviga obo al la leĝo de la kolektivo, sed sen tiu leĝo la kolektiva vivo ne eblus, almenaŭ en paco.

**Ĵansebo :**

Ĉar en mia vivo alternis soleco kaj nesoleco, mi konstatis, ke la soluloj estas traktataj tiel aĉe kiel malplimulto (gejoj, migrantoj, kripluloj, ktp). Por soluloj tio estas kroma malfeliĉaĵo. Por sendependemuloj tio estas ĝeno por ilia libereco. Ĉu oni povas paroli pri la rajtoj de la soluloj ?

**BGD :**

La nuntempa civitano estas nur socia asekurito, kun matrikulo. Escepte de tio, ŝili ne havas rajton. En nia socio solulo ne havas rajton, ne povas mem sin defendi. Ekzemple, ĉiam ŝili devas sin turni al iu kolektivo (aliĝi al partio, sindikato, religio, sekto, ktp).

Nuntempe, reala civitaneco ne ekzistas. La nuna estas submetiĝo al iu grupo, kolektivo, aŭ al iu reprezentanto (deputito, delegito).

Rilato de la solulo kun nesoluloj (paroj, familioj): la solulo sentas sin fremda, nekomforta. Soluloj povas pli facile rilati inter si, ol kun grupoj. Ne ekzistas ebla reciprokeco inter la solula kaj la kolektivana pensmanieroj kaj agadoj. Solulo kutime rilatas kun aparta kolektivano pro aparta motivo, sed malofte kun la tuta kolektivo. Tiucele li devas fariĝi mem kolektivano.

**Suzanne :**

*Pro diversaj okazintaĵoj iuj fariĝis soluloj :*

- ili naskiĝis en malgranda familio, estis la nura infano ; ili profesie laboris hejme, kio malpliigas la rilatojn kun la aliaj homoj. Tio ĉi, iom post iom, kutimigas al la estonta soleco.

- pro la neebleco renkonti, inter la urbloĝantoj, homojn havantajn samajn interesojn... Kiam oni estas la postrestanto de familio, tutnature oni iras al soleco.

Iuj antaŭvidas tiun periodon kaj antaŭe ĝin preparas, serĉante ŝatokupon, kiu pludaŭros en la estonta soleco.

Kiel ĉio ajn, la soleco estas duflanka : estas agrable suferi nenian trudon en la persona vivo, sed kelkfoje ĝi fariĝas peza.

**Kribo :**

Por mi, kiu naskiĝis solinfano en izolita kampara regiono kaj nun pludivas preskaŭ same, soleco estas la bano, en kiu mi kutime troviĝas. Al tiu soleco mi eĉ sopiras, post miaj maloftaj, sed ja necesaj "vizitoj" al la "socio". Mi facile iras al la homoj, interŝanĝas kun ili, sed mi ne povas elteni longe: post rikoltado de diversaj impresoj kaj ideoj el la ĉirkaŭa socio, mi bezonas reveni al soleco por trankvile kribri, ordigi, digesti la ricevitan "kapitalon", same kiel abelo nepre revenas al la abelujo por fari sian mielon...

Mi havas la impreson, ke Esperantio estas loĝata de granda plimulto da gesolecemuloj. Iuj verŝajne kompensas en kongresoj aŭ kunvenoj sian tutjaran mutecon. Ĉu mi eraras ? Ne estas koincido, ke multaj E-istoj aspektas stranguloj en sia urbeto !

(La ĉi-supraj kontribuoj konsistigis la enkondukon al tiu nia 15a debato per ĉenleteroj. Red.)

**J.G. :**

Laŭ mi, soleco estas precipe sento. Oni povas sin senti sola meze de cent personoj en kunveno, kongreso, ktp, kiam oni havas gravan personan problemon, kiu ne kongruas kun la celo de la grupo, de la "celkaŭzo". Mi tion ofte spertis. Oni povas sin senti sola ankaŭ en la familio, en la paro, kiam la komunikado estas malfacilega.

Soleco povas esti ankaŭ situacio vole elektita kiel por la ermitoj, aŭ trudita kiel por vidvo aŭ vidvino, por lasta pluvivanto de familio, ktp.

La homo estas socia estaĵo. La lup-infanoj vartitaj meze de la bestoj sen homa ĉeesto ne parolas. Ili konas nur la gestojn de pluvivo.

La nuna socio kiel kompensaĵon al la sekureco trudas pli kaj pli da kolektivaj premdevigoj. La idealo estus elektitaj komunumoj, kie oni povus jen izoliĝi jen renkonti samideanojn, sed la malfacilaĵo estas ke la deziroj kongruu !

**Jakelino : MALAVANTAĜOJ KAJ AVANTAĜOJ DE LA SOLULINECO**

Jam de ses jaroj mi vivas sole en mia loĝejo. La vivo de solulino havas, kiel ĉio, avantaĝojn kaj malavantaĝojn :

**malavantaĝoj**

- psika : estas malfacile taksi la rolon de soleco je la psikaj malsanoj. Mi foje havas angorkrizojn, mi foje estas deprima. Sed ĉu soleco estas la kialo de mia psika nestabileco ? Aŭ ĉu mia psika malstabileco kaŭzis, ke mi ne trovis kunulon ? Miaj krizoj havas multajn kialojn. La (kronologie) unua kialo estas la suferoj de malfacila naskiĝo. Do ne estas facile taksi la reciprokan influon de soleco kaj de psikaj problemoj. Iam mi ricevis leteron de amikino el la tempo de miaj studoj : "Mi ne plu povas elteni mian edzon kaj miajn du infanojn; miajn lernantojn - ŝi instruas la germanan lingvon en liceo - mi volas sendi al la diablo. Mi envas cian liberecon, ci povas fari, kion ci volas, sen ĉiam havi iun sur la dorso." Tiel mi eksciis, ke ekzistas la deprimo de la edzino. De tiu tempo, ŝi kaj mi resaniĝis de niaj malsamaj deprimoj.

- ekonomia : Mi pagas al la imposta administracio pli ol la duonon de tio, kion pagas paro sen infanoj. Krome, mi estas sola por pagi la luprezon de mia

loĝejo. La kosto de elektro estas la sama, ĉu la lampo konsumas por unu persono, ĉu estas du personoj en la sama ĉambro.

Krom tiuj grandaj elspezoj estas ankaŭ la ĉiamaj problemoj de la ĉiutaga vivo : Ne eblas aĉeti unu jogurton, la minimumo estas 3, sed la jogurto, kiun mi preferas, estas vendata sesope. Ĉar mi ne tagmanĝas hejme, mi hezitas aĉeti 6 jogurtojn. Eblas aĉeti unu pomon, sed mi timas la rigardon de la vendistino. Ne eblas aĉeti la kvaronon de unu ruĝa brasiko. (Parenteze mi demandas min, kiel elmerdiĝas la gepatroj de 3 infanoj, ĉar nenio estas vendata kvinope). Kion fari, kiam la recepto de kuko por 4 personoj estas "Prenu tri ovojn" ? Mi iam trovis en la biblioteko, kie mi laboras, libron kun titolo "La kuirado de la fraŭloj". Temis pri libro por fraŭlaj viroj, kiuj deziras inviti en siajn hejmojn fraŭlinojn, por ebla eksfraŭliĝo. Nenio estas antaŭvidita por unu porcio : se oni estas fraŭlo, oni invitas fraŭlinon. Kaj se oni estas sola en la vivo, kredeble oni iras al la restoracio !

- praktikaj : Mi estas tute mallerta pri manlaboroj. Kiam necesas ŝanĝi ampolon, mi vokas najbaron. Antaŭ nelonge, difektiĝis la fleksebla tubo de mia duŝilo. Mi sciis, ke necesas nur malŝraŭbi, anstataŭigi la tubon per nova, kaj reŝraŭbi. Sed jen : mi tute ne kapablas fari tiun laboron. Mi do atendis pacience, ke la posedanto de mia loĝejo bonvolu sendi laboriston. Tiu el miaj fratoj, kiu estas fraŭlo, elmerdiĝas pli bone ol mi, ne nur li scipovas ŝanĝi tubon, sed krome li scipovas kuiru pli bone ol mi. Tamen la kudradon kaj purigadon de liaj vestaĵoj faras nia patrino.

- al tiuj malavantaĝoj de la fraŭla vivo aldoniĝas problemoj specifaj de la solulinoj. Virino ankoraŭ rigardebla ne povas resti sola dum kvaronhoro en publika loko. Tion mi spertis, kiam mi studis. En junio, la varmeco de ĉambro en universitata loĝejo estas infereska. Tial mi iam prenis studlibron, kaj iris prepari ekzamenon sur benko de publika ĝardeno. Rapide alvenis sola viro : "Kion vi faras sole sur tiu benko, ĉu vi ne havas amikon aŭ fianĉon ?... Ĉu estas interesa la libro, kiun vi legas ?... Kial vi ne respondas al mi, ĉu vi estas kolerema ? Ĉu vi timas min ? Ĉu vi estas rasista?" Kiel serioze studi en tiaj kondiĉoj ? Mi do reiris al mia ĉambro, kaj mi povas diri, ke mi ŝvitis super

la laboro ! Mi iam rakontis tion al konato, konkludante, ke knaboj estas pli bonŝancaj ol knabinoj je la preparado de universitataj ekzamenoj. Li respondis al mi, ke nuntempe ankaŭ juna rigardebla viro ne povas resti sola en publika ĝardeno. Ho tempoj, ho moroj ! Kion oni ne faras nome de la virina liberigo ! Sed la ĉefa malavantaĝo de la solulineco estas la maleblo piediri dum la nokto. Dum la pasinta vintro, mi iam revenis piede de spektaklo je la 11a horo vespere. Kiam mi atingis la avenuon, kie mi loĝas, aŭtomobilanto mallevis la fenestron de sia veturilo, demandante, ĉu mi volas promeni kun li. Mi ne respondis, sed mi ne timis, ĉar tio okazas ĉiufoje, kiam mi piediras nokte. Sed tiam li turnis, blokante mian vojon, eliris el la aŭtomobilo kaj kaptis mian brakon. Mi ekkriis. Pasis du aliaj aŭtomobiloj, kiuj ne malrapidiĝis, kaj videble faris nenion por min helpi. Tamen tio timigis mian agresanton kaj li lasis min. Mi timegis, ĉar tiu agreso okazis nur dudek metrojn de mia loĝejo. Nuntempe mi iras al spektaklo aŭ kunveno, nur se mi certas, ke iu povos min rekonduki hejmen. Tio estas problemo de virino, kiu ne havas aŭtomobilon. Pro fizikaj problemoj mi ne kapablas uzi veturilon, eĉ ne biciklon. Mi kapablas longe marŝi, kaj mi povas piediri je grandaj distancoj sen problemoj. Sed jen : nokte tio tute ne eblas, se mi ne havas kunulon. Iam la edzo de la amikino, pri kiu mi aludis, rakontis al mi, ke li revenis sola en sia aŭtomobilo nokte, sed li perdiĝis en la urbo, kaj volis demandi pri la vojo knabinon, kiu piediris sola. Li ne komprenis, kial la knabino obstine rifuzis respondi. Antaŭ kelkaj jaroj, virina movado organizis grandan manifestacion : multaj virinoj promenis nokte en la urbo. Bedaŭrinde mi forestis el Strasburgo, kiam okazis tiu manifestacio, alie mi certe partoprenus. Kiel solulino, mi ne havas la problemon, ĉu mi abortu aŭ ne, kie mi povus lasi mian bebon dum mi laboras, ktp. Sed gravega estas la problemo de la libereco piediri nokte. Pro tiu malfacilo, mi ne eliras el mia loĝejo vespere pli ofte, ol eliras patrino de junaj infanoj.

#### **avantaĝoj**

La avantaĝo estas la tuta libereco : se mi vidas, elirante el la laboro, ke okazos je la 18a horo de la sama tago granda manifestacio kontraŭ SS 20,

mi povas iri rekte de la laborejo al la manifestacio sen bezoni telefoni al iu ajn por sciigi mian prokraston. Se mi volas rigardi ĉe la televido dokumenton pri la vivo en malliberejoj, neniu plendas, ke ĉe la germana televido estas samtempe elstara elsendo pri sporto. Se mi volas trapasi semajnon en La Chaux de Fonds en junio, mi ne bezonas permeson de mia kunulo, kaj mi ne bezonas cerbumi, kiu zorgos pri la infanoj.

### **bilanco**

Mi ne scias, ĉu pli gravas la avantaĝoj aŭ la malavantaĝoj de mia situacio. Kiam mi estas deprima, mi envias la patrinojn. Kiam mi estas bonfarta, mi ĝojas pri mia bonŝanco. Homo estas estaĵo, kiu al kutimiĝas. Nun estas malfacile por mi imagi vivon kun kunul(in)o. Eble mi povus, se mi havus loĝejon sufiĉe grandan, por ke ĉiu el ni havu sian propran ĉambro. Kiel besto, mi bezonas mian teritorion, mi ne imagas, ke iu povus daŭre vivi en mia ĉambro. Se mi trovas kunulon, necesus, ke mi luan alian loĝejon, kaj ke tie mi havu mian propran lokon. Mi ne estas postulema: mi estis edukita kun 4 fratoj. Mi vivis en la sama ĉambro kiel la du plej junaj el ili. Sed estis kurteno, kiu estis limo de mia teritorio. Mi aŭdis ĉion, kion la knabetoj fariĝis, mi al kutimiĝis verki disertacion, dum ili malantaŭ la kurteno kverelis pri globetludo, sed ĉiam restis tiu kurteno, kiun mia psiko bezonas.

Tamen tiu psika kurteno funkcias nur unudirekte: mi malfacile konsentas, ke iu eniru en mian teritorion, sed mi ofte eliras. Mi ne havas la bonŝancon kompensi mian solecon per interesa laboro: mi stampas librojn por akiri la monon necesan por min vivteni. La situacio estus neeltenebla, se mi ne havus kelkajn rimedojn por min esprimi. Mi sentas la bezonon esti utila, aŭ almenaŭ kredi, ke mi estas tia. Mi estas membro de Amnestio Internacia, kaj mi foje manifestacias por paco. Mi helpas en la fabrikado de kontraŭatoma bulteno, ktp.

### **kaj Esperanto ?**

Ne nur la verda medio estas invadita de soluloj: iam falis inter miajn manojn gvidlibro por pastroj, kiuj zorgas pri skoltoj. Estis skribite, ke oni devas atentigi la fianĉinojn de la skoltestroj pri la grandeco de skoltismo, la utileco de la movado por la Eklezio,

la Socio kaj la Kajtielpluo, ĉar plej ofte, kiam skoltoj edziĝas, estas la fino, rapide li ekziĝas, ĉefe kiam venas infanoj (principe edzino de katolika skoltestro ne prenas pilolon!).

Nuntempe kelkaj Esperanto-centroj provas organizi renkontojn, kien eblas veni kun infanoj. Tio estas la kazo en La Chaux de Fonds, en Grésillon, ktp. Por sola persono, la ebleco korespondi kun homoj el diversaj landoj, renkonti fremdulojn, ktp, estas tre grava. Same kiel ĉe la skoltoj, foje la Esperanto-medio fariĝas anstataŭa familio.

Ĉu Esperanto anstataŭas familion, aŭ ĉu ĝi funkcias kiel edzperanto? Kio okazas, kiam aktivulo edziĝas? Jen temo por alia diskuto...

### **Satana dinana grupo :**

*Estas malfacile paroli pri tiu temo, ĉar soleco kunigas plurajn difinojn. Paroli pri trudata soleco (malliberejo, fizikaj handikapoj, morto de amatoj...) estos alia debato. Ni parolas nur pri la pozitiva aspekto de la soleco.*

*Soleco estas necesa, eĉ en paro. Soleco estas fizika kaj mensa bezono, por ripozi, por sin mem retrovi, por cerbumi pri io ajn.*

*Same kiel oni bezonas iom da soleco, oni bezonas privilegion interparolanton (kunulon aŭ kunulinon...) kaj oni bezonas ankaŭ grupon aŭ grupojn por sin integri en la komunumon. Oni estas devigata interŝanĝi siajn demandojn, pensojn, ideojn.*

*Ni opinias, ke oni devas respekti tiun alternecon: solecon kaj nesolecon.*

### **Nicole D. :**

Estas estuloj, kiuj sole vivas, sole mortas, sole batalas kontraŭ ege pezaj kaj doloraj malfacilaĵoj... Estas estuloj, kiuj sole malesperas kelkfoje ĝis morto, sen iu ajn helpo... Pli-malpli, vole-nevole, ĉiu estulo vivas momentojn, dum kiuj li, ŝi estas sola, responsa, aparta... Sed kontraŭe, reciproke, okazas momentoj privilegiaj, dum kiuj eblas senti sin proksima de aliuloj, de sia medio, en harmonio, solidara. Ekz.: kun amataj personoj, legante libron, aŭskultante muzikon, vidante pejzaĝon aŭ artaĵon...

Kiam oni rekonas aliulojn kaj estas rekonata, ne eblas senti sin sola laŭ la negativa senco.

Estas estuloj, al kiuj ne eblas sin izoli, esti iom sendependaj : iuj laboristoj, gepatroj, aŭ kiam loĝejoj mankas. Ofte, la socia opinio juĝas frenezaj, nenormalaj aŭ suspektindaj ĉiujn izolulojn. Estas estuloj eĉ tre junaj, kiuj emas al soleco, aliaj kiuj timas solecon. Estas soleco de paro, gento, komunumo...

Mi same opinias kiel la dinana grupo kaj ankaŭ J.G. : Soleco, soleculo estas tre diversaspektaj kaj rilatas al sentokapablo. Mi aldonas, ke temas pri kapableco aŭ nekapableco sin adapti al iu socio aŭ medio, kaj kompreni, akcepti sian realecon...

Soleco aspektas pozitiva, kiam temas pri konscia elekto, kiam eblas mastri sian solecon, kiam eblas komunikado kun aliuloj, socio, medio, mense, kore kaj fizike.


Soleco ne elektita aspektas negativa, ĝi estas trudo, sufero, kroma vundo. Ekz. : Nekapableco pro psika afekcio (ĉu denaska, ĉu kultura) adaptiĝi, senti, kompreni, ami, sian medion. Kontraŭe, persono, kiu ne eltenas solecon, ofte suferas psikajn problemojn.

Ŝajnas al mi, ke nur individuo memstara, kiu jam konsciis pri sia unueco inter multaj estaĵoj ĉiam evolu-antaj kaj pli-malpli nedaŭraj, kiu komprenis, ke li vere estas "integra parto" de la mondo, kiu akceptas tion, kapablas ĝui poziive kaj solecon kaj socion.

Emo al soleco povas esti fuĝo, egoismo, orgojlo kaj pli ofte egocentrismo, eĉ malestimo aŭ nefido al aliuloj, aŭ komplezemo al si mem. Pro nefido al si mem, pro timo al aliuloj, post grava vundo en sia koro, oni povas konsideri solecon kiel rifuĝejon necesan, eĉ fatalan.

Ofte ĉio, ĉiu aspektas "alia", kiel "objekto", kiel fremdaĵo, kiun oni juĝas aŭ ignoras. Aliuloj malofte aspektas kiel "alter ego". Pro tio, kiam oni responsas pri edukado de juna(j) infano(j), gravas, ke oni helpu al ili ekvilibre, memstare vivi kun la aliaj, ke ili kapablu komuniki, sin esprimi diversmaniere, interŝanĝi.

Unuavide E-istoj devus esti personoj scivolemaj, sentemaj, kiuj ŝatas komuniki, kiuj emas al kontaktoj. E-istoj devus pli facile amikiĝi, agi laŭ sia idealo, malofte suferi pro soleco, nek privilegii ĝin en sia vivo... Sed kia estas la realo ? Ĉu E-istoj ofte ne starigas novan genton marginan ? Ĉu ili ĉiam estas solidaraj ? Laŭ mia opinio, Esperanto ne faras



## ĉies voĉo pri ĉio ajn

Kial INKAL ?

demandas Lorenc' Mi.

Ŝajne nia redaktoro devas agnoski la marŝadon de eventoj kaj malfermi apartan rubrikon aŭ sekcion pri komputoroj kaj rilatataj temoj ! Ni esperu, ke ne ĉiuj fakuloj en la kampo provu aboni al revuo kaj aperigu fakajn artikolojn, ĉar tio certe alproksimigus la riskon de Babelismo en nia tendaro. Estas jam sufiĉe ĥaosa situacio, kiam en la sama kajero du artikoloj aperas, du artikoloj kiuj diskutas la saman problemon sed de du apartaj starpunktoj.

En la artikolo pri INKAL, kolego Ĵansebo starigas la retorikan demandon, 'Kial ne esperantaj komputoroj kun (la tuta alfabeto)?', kaj mem donas al ĝi la respon- don, 'Estas la plej racia solvo por trakti tekstojn en Esperanto.' Bone!

Sed en la posta alineo, kolego Ĵansebo "proponas alian solvon..." Mi ne komprenas !!

Tiu propono de aliformigo de alfabeto de ISO, tamen, meritas diskuton. La propono, pensi pri 130-litera alfabeto estas certe troa solvo. Kiu iam aŭdis pri diakrita signo ligita kun B, F, M, P, T aŭ V, ekzemple? Kaj kial proponi al la germanoj, ekzemple, ke ili skribu ä per a, aŭ al la angloj, ke ili skribu th per

-----daŭrigo p.12--

SOLECO... EMO AL SOLECO...

miraklon, se ne estas inklinado al mensa kaj elkora malfermo al la mondo. Eblas, ke Esperanto helpu al komunikado, al komprenemo, konsekvence ebligu eliri el soleco, eskapi al iu ajn "enfermiĝo"...

Konklude, jes necesas por la propra ekvilibro alternado inter soleco kaj nesoleco, kondiĉe ke tiu soleco aŭ nesoleco ne estu trudata kaj ne estu simptomo de iu afekcio. (Pliaj kontribuoj pri tiu ĉi temo aperos en venonta L!)

t^, kiel proponita? Ĉu ne estus multe pli bone skribi ĉ per ĉ ol per c'' ? Kion ni faru pri majusklaĵ literoj? Ĉu ni devas pensi pri 260-litera alfabeto ?

Certe estas konsilinde pensi pri la neceso ebligi la aldonon de ^ aŭ ^ al certaj literoj, sed ni ne forgesu, (ĉu aŭ ne ISO rekomendas tion), ke aliaj lingvoj bezonas ' kaj ` por certaj literoj.

Feliĉe por ni Esperantistoj, ni ne havas ian problemon, ĉar nia lingvo neniam bezonas diakritan signon; la 28 literoj plenumas por ni ĉiujn bezonojn en la lingvo. Logika sekvo de tiu konstato, tamen, estas, ke kiam por literumi propran nomon ni devas uzi, ekzemple, ŭ , ni ne plu literumas tiun nomon en la Esperanta alfabeto, sed en iu alia; plej eble la solvo estas uzi la formon, en kiu ĝi aperas en la alfabeto de la lingvo, al kiu tiu propra nomo apartenas, se tiu ago eblas en la aparta situacio.

Ĝenerale, kiam en artikolo aŭ raporto en la internacia lingvo, oni devas aludi al propra nomo en nacia lingvo, estas konsilinde skribi la nomon du-foje, unue en la nacia lingvo (laŭ la eblecoj de la uzata skribilo), kaj due por doni indikon de la proksimuma literumado por akiri la sama(j)n sono(j)n en Esperanto. Kiel ekzemplon, mi citas el aktuala raporto mia : "... Tiu teorio estis unue vortumata de John Maynard Keynes (ĝon mejn'd kinz), la fama ekonomikisto..." Ni devas agnoski, ke la sono donata de la E-literumado estas nur tre proksima al la anglalingva originalo ; ĝi ne estas absolute aŭtentika, kaj ĉiuokaze mi devis uzi la artifikon de apostrofo por indiki la tre mallongan, preskaŭ neekzistantan sonon de la dua silabo de mejn'd. Sed tamen, tiu tre proksima literumado okazis sen iu alpreno de novaj literoj aŭ artefaritaĵoj al nia laŭ-Fundamenta lingvo.

Resume, do, mi devas diri, ke mi ne rekonas ian neceson subteni la proponon de kolego Ĵansebo. Rotterdam, 1983-10-01.

\*\*\*\*\*

Solvo de la krucvorta enigmo de L! 50 :

Horizontale : 1. MATEMATIKO. 2. ALILOKE. LM. 3. LAR. KURTEN. 4. FRAT. ŜMIRI. 5. AMNEZIO. IB. 6. CI. NI. MOKU. 7. ŜANCELAS. 8. LEO. KITELO. 9. EKSPATRIAĴ. Vertikale : 1. MALFACILE. 2. ALARMI. 3. TIRAN. ŜOS. 4. MOK. ZINKA. 6. AKUŜI. CIT. 7. TERMOMETR. 8. TI. OLEI. 9. KLERIKALA. 10. OMNIBUSOJ.

## Pri skribado de Esperanto per komputoraj tajpiloj

Kion uzi anstataŭ la kunĉapelaj literoj ŭ, ĥ, ĉ, ĵ, ĝ ? Ĉar ĝis nun ne ekzistas internaciaj formoj por tiuj ĉi literoj, mi opinias, ke oni devus :

- trovi inspiron en solvoj jam adoptitaj en iuj landoj.
- Tio signifas, ke ni senkonsidere ne fiksu meĥanike ekzemple ĉ = cx, ŝ = sx, ktp.
- fari logike : unu litero aŭ unu donita literaro respondu al ununura prononco.
- estigi solvon plejeble elegantan.

Mi proponas jenan sistemon, tuj poste de mi pravigitan :

ŭ = w, ĥ = x, ĉ = cy, ŝ = sy, ĵ = zy, ĝ = gy.

### Eksplikoj

- 1) Laŭ la internacia fonetika alfabeto, **w** kaj **x** respondas al la esp-aj ŭ kaj ĥ. Plie, w estas jam de longe uzata en Anglalingvio, kaj x estas tuj komprenebla por ruslingvulo (XOP = ĥoro) kaj eĉ por greklingvulo (Χορος = ĥoro).
- 2) Pri ĉ kaj ŝ : uzi anstataŭ ili "ch" kaj "sh" (laŭ Fundamento) ŝajnus alloga solvo, ĉar "ch" estas prononcata "ĉ" jam en Hispanio, en Anglio, ktp, kaj simile... "sh" = ŝ en Anglio, Danio, Albanio, ktp. Sed estiĝos malfacilaĵoj, se oni iam ellernos Esperanton per tiu ĉi sistemo. Kiel la eklernanto prononcos "dishirtigi", "ĝishavena vojo", "senchava rimarko", ktp ? Kion signifos ekzemple "tranchonto" ? Ĉu "honto pri/pro la tranco", aŭ tranĉonto, ulo kiu tranĉos ? Konsideru ankaŭ : eks-halta/ek-ŝalta, eks-hoka/ek-ŝoka, ktp. Eĉ se la kuntekstoj estus sufiĉe klaraj, oni miaopinie ne devus permesi esperantigon al tiaj mallogikaĵoj. Verŝajne la zamenhofa elturnaĵo aldoni "h" post la senkromsignitaj literoj c, s, j, g, h, estas nek eleganta nek logika. Kiel estus legota : "operachhorestro" ?! Operaĉhorestro (orkestrestro por aĉa opero) laŭ la zamenhofaj konsiloj pri senĉapeligo !

Ni komparu kun aliaj lingvoj. Al ŝ respondas laŭ la prononco "sz" en la pola lingvo, "sj" en la nederlanda, "sy" en la eljapana transskribo (Kunrei-sistemo), "sch" en la germana, ktp. - krome la jam menciita "sh". Al ĉ respondas "cz" en lapola, "cs" en la hungara, "ty" en eljapana transskribo, ktp, krome la jam citita "ch".

Uzi **sy** kaj **cy** anstataŭ ŝ kaj ĉ forigas la mallogikecon de "sh" kaj "ch" (ĉar "y" ne estas litero de la esperanta alfabeto). Kaj **sy** almenaŭ estas jam ekzistanta formo en unu nacia lingvo, la japana (ekz. **syôgun** = ŝogun, feŭda ĉefo).

3) ĵ kaj ĝ tamen staras kiel vera problemo! Al ĵ respondas laŭprononce **zs** en la hungara, **rz** en la pola, **ž** en la ĉeĥa, **zh** en la albana, [ʒ] en la internacia fonetika alfabeto, kaj simple "j" en kelkaj lingvoj. Estas rimarkinde, ke en tiuj ĉi ekzemploj "z" estas ĉiam uzata, sole aŭ kun alia litero. Mi proponas do ĵ = **zy**, formon, kiu cetere estas uzata de la eljapana transskribo (ekz. **zyuban** = ĵuban, subkimono). Adopti ĵh aŭ zh anstataŭ ĵ evidente estus multe pli mallogike, dum "jy" eble estus alia taŭga solva formo.

Al ĝ respondas "dz" en la pola, "dz" en la serbo-kroata, [dz] en la internacia fonetika alfabeto (kaj "xh" en la albana, "c" en la turka, "j" en la sanskrita, ktp). Kion preni? **gh**, **dz**, **dh** aŭ **dzy** (ktp!) ne konvenus. Do, kial ne resti kun **gy**?

Ĉu tiu sistemo estas la nura eblaĵo? Certe ne. Sed se iam eknecesas, oni ĉiel plej rapide interkonsentu pri la transskribadosistemo... La sola solvo evidente konsistas en adaptiĝo de la maŝinoj por skribado laŭ la aŭtentike esperanta alfabeto.

T.F.

Bonvolu redoni ilecon,  
al kio ĝi apartenas!

1. En la paĝo IL-a de PVE, ĉe la tria linio de la difino, oni povas legi "aparato"n; ĉe la tuj sekvanta, aperas ankaŭ la verbo "plenumi", kies gravecon ni ekzamenos poste.

2. Emfazi la ilecon de komputiloj estas bona filozofia sinteno: ili devas esti je nia servo, kiel iloj. Neniam la homoj devas perdi la mastradon super ili. Bedaŭrinde, tio jam okazis eĉ ĉe uzado de pli simplaj maŝinoj!

3. Fakte, la E-vortaroj mutas pri la radikoj **KOMPUT'** Tamen oni trovas ĝin ĉe aliaj lingvoj, ekzemple ĉe la itala.

4. En la itala ekzistas du preskaŭ samaj radikoj, eble devenantaj ambaŭ de la sama latinaĵo.

- **KOMPUT'** verbe: kalkuli kaj decidi

- **KOMPIT'** substantive: plenumaĵo, ofte skriba kaj lerneja.

5. Do, **KOMPUTILO**, ĉar "**KOMPITILO**" estas ne-eleganta vorto, estas maŝino ĉiam uzata kiel **ILO** por kalkuli, decidi, plenumi. (Ĉu la jusedziniĝinta estas tro bela?).

Venontfoje mi parolos pri la tutsimpla ĉapeligo ĉe ĉiuspecaj **KOMPUTILOJ**, sed tio estas nur teknika afereto...

T. Lorenso.

### KIU ERARAS?

- Ĉu tiu, kiu volas progresigi E-on por la bezonoj de la nuna mondo, aŭ tiu, kiu volas regresigi ĝin per ideoj kiel tiu de la "memstaraj vortoj", inventita por "pruvi" la perfektan regulecon de E-o, kaj aliaj komplikaj artifikoj, dum la veraj fundamentoj de I.L. estas logiko, scienceco kaj simpleco?

PMG.

### LA NEŬTRALA GENRO EN ESPERANTO (duon-serioze)

En Esperanto, kiel en la angla, ne ekzistas propre **neŭtra** sed "neŭtrala" genro.

Laŭ la Plena Vortaro, "neŭtra" signifas "apartenanta al neniuj sekso". **KUKO** estas ja neŭtra; sed **KOKO**? **KOKINO**? Por ĉiuj tri ni uzas la saman pronomon, "**ĜI**" (= en la angla, **IT**).

"**ĜI**" estas pronomo **neŭtrala** rilate al la sekso:

ĝi estas bovo/bovino/bovuĉo/bovido...

rilate al la nombro:

"ĝi estas subaĉetoj" (**Zamenhof**-a ekzemplo)

kaj rilate al la persono:

"ĝi estas mi!" (**Z**-a ekz.)

"**LI**", kontraŭe, estas pronomo **neŭtrala** nur rilate al la sekso. La proverbo "Ĉiu amas personon, kiu estas simila al li" ne estas sekse diskriminacia, ĉar "ĉiu" estas sendube neŭtralgenra, kio neprigas la ĉefan, neŭtralan signifon de "**LI**".

Kial mi diris "la ĉefan"? Nu, en Esperanto mankas vera virgenra pronomo, sed la neŭtrala persona pronomo **LI** povas fariĝi bona anstataŭanto, se oni, en



okazo de ebla dubsenceco, neprigas la neŭtralan sencon, antaŭmetante la ĝenerale-neŭtralan pronomon "ĜI".

Komparante "ĜILI" kun "ŜI/LI" kaj "ŜILI" mi rimarkas: 1) "ĜILI" tute preteratentas la sekson, do taŭgus ankaŭ por anĝelo, roboto, senseksa aŭ plurseksa alimondulo...

2) "ŜI/LI" egalas al ŜI-aŭ-LI, do ne estas kunmetebla. (Ĉu vi povus kunmeti "VIRO/VIRINO"? Kion tio signifus poste? "ŜI/LI" emfazas, ke oni devas esti aŭ viro aŭ virino (forstreku la nevalidan).

3) "ŜILI" emfazas la **ambaŭseksecon**: en Italio estas fame konata belega virinuĉo, nomata "Eva Robbins"; koloraj fotoj pri ŝili en Eva-a kostumo (tio estas, tute nuda) montras klare ankaŭ ŝilian similecon al... Adamo.

Kaj, ĉar evidente "Ĉiu "ŝili" havas sian "liŝi", la bela virinuĉo antaŭ kelkaj monatoj edziĝis al viruĉino. Ordinara fino de neordinara fabelo.

Do, la tria-personaj pronomoj en Esp. estas: la **viringenra** "ŜI", la (**pseŭdo**)-**virgenra** "LI" kaj la neŭtrala-persona "(Ĝ)LI", kies pluralo estas "ILI". "ILI", tamen, povas esti uzata ankaŭ por ne-personoj, ĉar la ĝenerala pronomo "ĜI" estas...tro ĝenerala.

La samaj genroj validas por la nomoj, sed ni havas krome la genron "neŭtralan-nepersonan", ĉe kiu la sekso povas esti esprimata, sed tio tute ne influas la pronomon.

KUKO, KOK(UC)O kaj KOKINO apartenas al la genro neŭtrala-nepersona. Parolante pri ili, oni devas uzi la pronomon "ĝi" kaj la pronomojn de la O-serio (kio, nenio, ktp).

Ekzistas pluraj nomoj vaste uzataj, ĉe kiuj ni preskaŭ ĉiam subkomprenas la sufikson "uĉo". KOKO estas unu el ili, sed ni havas ankaŭ 'viro', 'patro', 'filo', 'edzo'... Efektive, en la ĉiutaga vivo ofte sufiĉas esprimi unu el la seksaj sufiksoj kaj subkompreni la alian. Sed tiel perdiĝas la ebleco esprimi la seksnedifinitecon kaj ankaŭ la konscio, ke la vort-radiko estas fundamente **neŭtrala!** Mi do proponas emfaze memstarigi (aŭ duobligi) la substantivan finaĵon -o, por akcenti jen la neŭtralecon jen la seksecon.

Ekz. 1) "ŝi estas la ununura viro-o en nia registaro" (Aliaj lingvoj, ne tiel riĉaj kiel Esp., estas devigitaj esprimi la koncepton per la simpla "viro", kio estas iel absurda).



## VORTOJ DE MALJUNULO

---  
valo  
---

### UNUA DE NOVEMBRO

Floroj, multaj floroj. Belegaj krizante-moj, kaj aliaj. Ĉe la piedo de la muroj de tombejo, aŭtoj en longaj vicoj. Homoj gravmienaj, riĉaj kaj malriĉaj, portas bukedojn aŭ florpotojn. La kulto al kadavro, verve primokita de nia kormemora Lanti, konservas siajn fidelulojn.

La florvendistoj afiŝis: "Donacu florojn al tiuj, kiuj ne plu estas". Traduko: al tiuj, kiuj ne havas okulojn por ilin vidi nek nazon por ilin flari. Tiuj honorindaj komercistoj, cetere, estas simpatiaj, same kiel la kultivistoj de florgardenoj, artaj laboristoj. Ili meritas vivi per sia laboro. Ni do aĉetu florojn - sed por ilin donaci al vivantoj, vid- kaj flarkapablaj, kiuj scipovas ilin apreci.

Mi neniam iras al la tomboj de miaj gepatroj, geavoj, geonkloj, de mia kuzo mortigita ĉe Verduno, de mia juna kuzino viktimo de aŭtoakcidento, de miaj (jam multaj) forpasintaj geamikoj - sed pri ĉiuj mi fidele gardas la memoron. Mi deziras, ke miaj amatoj same ne vizitu mian tombon. Mi scias, ke ili gardos mian memoron en sia menso, aŭ, kiel oni diras, en sia koro. Jen estas la sola pluvivado, al kiu mi aspiras.

Cetere, mi trovas bone, ke ili memoru pri mi, sed dezirinde, ke ili pli pënsu pri siaj idoj kaj estontaj posteuloj. Utila estas la memoro pri la spertoj en pasintaj tempoj, sed necesas vivi en la nuna, kaj turni sian penson precipe al estonteco.

SENŜANĜA  
KRESKO KAJ  
DISVASTIĜO...



ĈU  
TIO ESTAS ĈIAM BONA AFERO?

N.B. La latina vort-radiko "VIR" enhavas la ideon "plenfort", ĉi tiun ideon emfazas la duobla o-finaĵo. 2) "Li estas viruĉo-o!" / "ŝi estas virino-o!" estas iom pli precizaj ol "Li estas vera viro!" / "Ŝi estas vera virino!" (Ĉu la aliaj estas falsaj?)

La memstarigo de la finaĵoj estas permesita de Zamenhof, do ne estas atenco kontraŭ la Fundamento. Laŭ mi, la radik-emfazaj apartaj finaĵoj devus esti senakcentaj aŭ duonakcentaj, ĉar la akcento devus peze fali sur la substrekitan radikon.

Konsiloj kaj kritikoj estos bonvenaj. Unu kontraŭargumenton tamen mi ne akceptos: "mi ne vidas la utilon enkonduki novaĵon", ĉar ĝi estas la sama kontraŭargumento, kiu baras la vojon al Esperanto. Se novaĵo estas logika kaj taŭga, ne atencanta la Fundamenton, tamen al vi ne plaĉas, trovu pli bonan solvon por tiuj, kiuj bezonas racian kaj kompletan Esperanton!

Ĝiz el Lamark.

## "DOMOKUPACIOJ" en la francaj urboj kiel radikala sperto

(la unua parto aperis en L! 50)

Nun kiu estas la franca situacio ?

Jen kelkaj ciferoj por kvanta taksado. La okupantoj loĝas ĉefe en Parizo : 3000 laŭ la urbestro, 2000 laŭ la ĵurnalistoj; en Montpellier (studenta urbo) kun 200, kaj kelkaj en diversaj urboj (Lyon, Marseille, Lille). Vi konstatas, ke la nombroj estas tre malaltaj kompare al la germana situacio kun pli ol dekmilo da okupantoj !

Kiel ni povas ekspliki la malfortecon de tiu movado kaj ĝian malfruecon ? Tamen, la objektivaj kondiĉoj por vigla movado ekzistas. En ĉiuj grandaj urboj de Francio estas manko de sociaj loĝejoj. Dum la lastaj jaroj la konstruado koncernis prefere la privatan domon. Tiu politiko estis faciligita de la ŝtato per avantaĝaj kredit-kondiĉoj, por krei mezajn klasojn.

Por klarigi la situacion, mi prezentas kelkajn ciferojn por Paris :  
- 49% da Parizanoj loĝas en 1- aŭ 2-ĉambraj loĝejoj.  
- la lasta statistika popolnombro (1982) indikas 160 000 loĝejojn malplenajn.  
- paradokse, la administraj servoj de la Urbodomo registris 70 000 petojn por loĝado (jaro 1982).

Aliflanke, la venko de la maldekstraj partioj PS-PCF en la ĝeneralaj balotadoj de la j. 1981 ne profunde ŝanĝis la situacion. La loĝ-problemo estas daŭre grava. Tamen, leĝo, voĉdonita en junio 1982, protektas la luprenintojn, kio ne ekzistis antaŭe. Tiu leĝo ebligis la akiron de kelkaj avantaĝoj : la luprenintoj povas konservi sian apartamenton dum 3 jaroj ; la altiĝo de la luprezco ne devas superi la prez-altiĝon, tamen fortan ĉe ni (10%).

Reage, la ludonantoj, bone organizitaj, iĝis pli postulemaj, cetere, kun la helpo de la loĝ-oficejoj privataj. Nun, la luprenantoj devas plenumi certajn kondiĉojn :

- koncerne la salajron, esti oficisto aŭ ricevi fiksan salajron.
- koncerne la naciecon, ofte la eksterlandanoj estas rifuzataj.
- koncerne la lu-kontrakton, la mongarantioj estas tre fortaj : 2 aŭ 3 monataj luprezcoj pagendaj antaŭe.

Tiu agresema agado de la posedantoj estas tre malfavora al kelkaj kategorioj de personoj : ĉefe la gejunuloj (laboristoj aŭ senlaboruloj) kaj la gast-laboristoj.

Tia situacio klarigas la eksplodon de la nombro da neleĝaj okupantoj: de du jaroj la nombro kreskis de 200 al 3000 en Parizo.

\* \*  
\*

Jen alia punkto por diferencigi la francan situacion de la nederlanda

aŭ la germana. En Francio, de la komenco, la registaro kaj ankaŭ ĉiuj urbestroj ĉiam rifuzis la "squatters" (okupantojn) kaj ili elektis subpreman politikon kontraŭ ili. Ekzemple, en Parizo, la sinteno de la du politikaj frakcioj estas sama. Laŭ ili, la "squatters" samsignifas kiel teroristoj. La ĉefo de la socialista grupo en Parizo skribis: "estas urĝe agadi, por ke Parizo ne konu, pro disvastiĝo de la okupacioj, la situacion de Berlino aŭ de Amsterdamo".

La pozicio de la politikistoj estas tre klara.

Vi komprenas do la maltrankvilan situacion prizorgatan de la policistoj; tial, la plimultiĝo de la okupadoj estas tre malfacila. **Ne eblas la akordiĝo kun la aŭtoritatoj.**

\*

Jen mi tuj prezentos la analizon, kiun mi faris pri la politikaj-radikalaj okupacioj. Sed mi devas precizigi, ke tiuj okupacioj neleĝaj, politikaj estas malmultaj. Multe da eksterlandanoj, kiuj ne povas pagi luprezon (ĉar ili estas senlaboraj) okupas malplenajn domojn...

En Parizo, ekzistas nuntempe debato pri elekto de taŭgaj metodoj. Ni povas distingi du tendencojn:

- tendenco pli leĝeca kaj defenda (ekzemple, la asocio "Okupantoj-Renovigantoj");
- alia tendenco, pli revoluciema kaj ofensiva.

\* La unua tendenco proponas jenan koncepton: "leĝa okupado". Tiu agado similas al la germana situacio. La ĉefa celo estas ricevi la leĝan konsenton por ĉiu okupacio. La argumento estas: "Ni estas okupantoj sen dokumentoj, tamen kun rajtoj". Ili uzas la artikolon 25 de la Deklaro de Homaj Rajtoj, kiu asertas, ke "la loĝado estas rajto por ĉiu individuo". Alia grava celo de tiu movado: la rifuzo al la marĝenigado.

\* La dua tendenco estas pli ofensiva. La okupado, laŭ ili, estas luktorimedo kaj ĉefe spontana ago. Ili ne interesiĝas pri daŭra okupacio en difinita loko. Sekve de tio: nenia animado en la kvartalo, preparado al la necesa alfrontado kontraŭ la policistoj kaj akcepto de la marĝenigado.

Analizu ni pli precize tiujn tendencojn.

\* La tendenco leĝeca: la asocio "Okupantoj renovigantoj de la 19a distrikto":

Ili organizas la okupadojn en la eks-proletaraj kvartaloj de Paris. La domoj apartenas al la urbo aŭ al urbaj organizoj, kaj estas malnovaj, ĝenerale detruigontaj. Poste, ili tuj organizas la sisteman renovigadon.

Por disvastigi la okupadon, ili prizorgas multnombrajn animado-agadojn: malfermo de memadministrata kafejo, ĉambroj por kunveni, teatro, ĉambro por danci. Ekzistas ankaŭ politikaj agadoj: gastigado de militrifuzantoj kaj de Solidarność.

Fine, ili partoprenas en la urbaj balotadoj kaj starigis alternativan liston kun ekologiista grupo.

\* Dua tendenco: Kiel ekzemplon de revoluciema okupado, mi tuj elektas tiun, kiu okazis en strato de Oriento (rue de l'Est) dum 8 monatoj (jaro 1982) en la 20a distrikto.

Ili okupaciis grandan apartamenton ĉe lasta etaĝo de konstruaĵo por burĝaj klasoj. La okupantoj deziras tuj estigi daŭran provokadon en la konstruaĵo kaj en la kvartalo. Ili organizas longtempajn kaj bruegajn festojn kun multe da biero kaj vino, kiuj finiĝas en diboĉaĵoj plej rimarkindaj. La okupado devas perturbi kiel eble plej multe: tio estas luktorimedo kontraŭ la urba ordigado organizata de la aŭtoritatoj, kiuj volas elfeti la malriĉulojn kaj la ĝenantajn junulojn ekster la urban centron.

Kompreneble, la okupacio estas tute kaj daŭre neleĝa: la komputiloj por akvo kaj elektro estas transformitaj por senpaga uzado. Ili elektis ofensivan kaj perfortan strategion. Dum la tuta periodo, ili preparas la alfrontadon kontraŭ policistoj, fortigante la konstruaĵon, kontrolado de la lifto, de la tegmento kaj balkonoj por vidi la alvenon de la policistoj; preparado de ofensiva materialo ("molotov-kokteloj", ŝpruc-estingiloj); peza blendado de la pordoj, konstanta gardado... La atako far la policistoj estis do tre perforta kaj ĝi montris la subpreman etoson, pozitiva rezulto laŭ la okupantoj.

\* \*  
\*

### Konkludo

La unua konstato pri la francaj okupacioj estas la malmulteco de la spertoj, kaj ilia marĝena pozicio. Ne ekzistas reala kunordigo inter la grupoj, kiuj agadas izolite. Plie, la partoprenantoj ne akordiĝas pri la rimedoj: malkonsento inter la leĝecemuloj kaj la kontraŭleĝecemuloj.

La rilato kun la aŭtoritatoj restas fundamenta fakto. La du politikaj frakcioj (maldekstra kaj dekstra) same kontraŭas la "squatts". Tiu politika situacio klarigas la subpreman sintenon de la policistoj. Tiuj deziras reliefigi negativan bildon de la "squatt" aŭ okupado. Ekzemple, ili lasas disvastiĝi en tiuj lokoj la toksojn kaj la detruojn. Tiel tiu aĉiĝo de la situacio malkuraĝigas la efikajn kaj konstrueman kandidatojn de la "squatts".

La eblecoj por agadi estas tre malfacilaj, ĉar bedaŭrinde nur defendaj. Neniam estis leĝa oficialigo de la okupacioj en urboj francaj, male al Nederlando. Kaj mi opinias, ke la situacio malpli-boniĝos kaŭze de la timo en la urboj kaj de la kreskado de rasismo, malgraŭ la loĝ-krizo.

Michel BAURET

La debato allogis nur dekon da personoj ; tamen ni bone diskutis. Mi bedaŭris la neeban komparon kun la germana situacio, tute diferenca ; sed la germanaj partoprenantoj preparis nenion pri tiu temo...Komencante, Alain dubis pri la efikeco de tiu movado "squatts", kiu ŝajnas al li tro marĝena por ebligi ĝeneralan ŝanĝon (socie). Li metis klaran ekzemplon : tiuj domokupacioj ne malebligis la altiĝon de la luprezo. Tamen, aliaj personoj respondis, ke tiu movado ne estas fakte revoluciema. Ĝiaj partoprenantoj deziras nur vivi komunume kaj diference, por limigita tempo. Kune ni konstatis, ke tiu sperto favoras la disvastiĝon de la homaj rilatoj, kiuj malfacile ekzistas en la urboj.

M.B.

## BIOLOGIO KAJ HOMA SOCIO

*Ĝis nun, escepte de kelkaj mallongaj eksperimentoj, la sociaj ŝanĝoj fiaskis. Hierarkio anstataŭis hierarkion; la ekspluatado kaj subpremado plu daŭris ; ŝanĝiĝis nur la estroj. Pri tio la ekzemploj multnombros. La movadoj por liberiĝo fariĝis la novaĵ superreguloj; ĉiufoje oni serĉis klarigojn : la ĉirkaŭa situacio estis malbona, la estroj estas perfiduloj, ktp...*

*La franca biologo kaj serĉisto Henri Laborit proponas alian klarigon, laŭ mi, originalan kaj diskutindan. Li komparas la organizadon de la homa korpo kun tiu de la socio. Tra tia esplorado li disigas hierarkion de la funkcioj kaj hierarkion de la valoro.*

*En la homa korpo ekzistas nur la hierarkio de la funkcio. "Tiam, en la viva organismo, ĉiu ĉelo, ĉiu organo ordonas al nenio, nur informas kaj estas informata, ne ekzistas hierarkio de povo sed nur de organizado".*

*Pli ol pri hierarkio, oni povas paroli pri nivelo de organizado. Oni povas diri, ke en la homa korpo ekzistas ĝeneraligita memmastrumado.*

*Kontraŭe, la homa socio de la neolitika epoko estas organizita laŭ la hierarkio de la valoro. Komence tiu valoro estis tiu de la fizika forto, de la lerteco,*

*de la sperto. Poste estis la hierarkio devenanta de la konoj, de la klereco. "En la sistemo de la hierarkio de la valoro, ĉiu individuo estas superreganta kelkajn kaj superregata de aliaj."*

*La celo de la homa vivo estas la kontentiĝo, la plezuro. La homo serĉas ĝin per la superregado. "Tio, kio faras la solidecon de kompleksa hierarkia sistemo, estas, ke oni trovas en ĉiu nivelo superregantojn kaj superregatojn." Ekzemple, nekvalifikulo superregas hejme sian edzinon, infanon aŭ hundon !*

*"Tiel longe dum ekzistos hierarkiaj sistemoj, la "plena" disvolviĝo de la individuo, kiel oni diras en balotparoladoj, estos nur mito."*

*H. Laborit disigas ankaŭ la informadan strukturon de la ĉelo, de la organo, de la homa korpo, de la homa specio, kiuj formas nevariajn rilatojn disde la cirkulanta informado, kiu celas cirkuligi mesaĝojn al ĉiuj elementoj de la strukturo. Ankaŭ la nocio de malfermita sistemo kaj fermita sistemo laŭ la biologia vidpunkto. Ekzemplo de fermita sistemo estas tiu de varmigo de akvo kun regulilo : la meza temperaturo ne varias, la retro-agado fermas la sistemon sur ĝi mem. La malfermita sistemo varias laŭ la informoj, kiujn ĝi ricevas de la ekstera medio.*

*Se oni aplikas tian nocion al la homa socio, oni povas diri, ke la hierarkio ligita al la specialigita informo donas la superregan povon al tiu, kiu posedas la plej gravan parton de la informado. "Estas ĉefe pro la fakto, ke li havas informan deficiton, ke la superregato estas tiel".*

*Kiun solvon proponas H. Laborit ? Organizan sistemon bazitan sur la ĝeneraligita informado en kadro sen hierarkio de valoro, kie nivelo de organizado de unu subensambleo dependas de la celoj kaj necesoj de alia pli kompleksa. "En tia sistemo oni komprenas, ke la ekstera regado ne estas hierarkia sed informeca. Sistemo bazita, kiel la homa organizo, sur la hierarkio de la funkcioj anstataŭ sur la hierarkio de la valoro. La politiko, en la vera senco de tiu vorto, devus esti la fundamenta aktiveco de la homo. Oni devas komprenigi al la homo, ke nur se li prizorgas la homajn interrilatojn, li povos trovi la sekurecon, la plezuron." La celo de edukado devus esti nek la senlima produktado de konsumajtoj aŭ la kreskado en la hierarkia skalo,*

sed la anstataŭigo de la soci-kultura aŭtomatismo per la ĝeneraligita informado, kiu nura povas ebligi la partoprenon de la individuoj en la sociaj strukturoj ekstere de la hierarkioj de valoroj.

J.G.

Por ĉiuj, kiuj scipovas la francan lingvon :

**Henri Laborit** : La nouvelle grille - Eloge de la fuite (La nova klarigkodo - Laŭdo al la fuĝo). Kolekto Idées-Gallimard.

## la malamata knabino

Novelo de Joel LAPORTE.

Pasintan monaton, mi estis dungita por instrui Esperanton al komencantoj, en la t.n. "Muelejoj de Metilernantoj", en BONNAT, apud GUERET. Havante tre malmulte da gelemantoj, mi profitis la okazon por alparoli gejunulojn, kiuj estis tie kiel kripluloj.

Iu knabino, precipe, vekis mian kompaton : Ŝi estis preskaŭ 18-jara ; tre timema, ŝi ne partoprenis la ĉiutagajn taskojn, sed restis sidanta samloke, dum pluraj horoj. Iun tagon, posttagmeze, mi petis de ŝi : "Ĉu vi ne tro enuas?". Surprizite, ŝi rigardis min : "Ĉu vi alparolas min, sinjoro?". Afable, mi jesis, kaj ŝi diris : "Neniam antaŭe, iu parolis al mi tiel afable ; neniam, vere!"

Mi rigardis ŝin kaj demandis : "Kial do?" Patricia (tio, kompreneble, ne estas ŝia vera antaŭnomo) flustris : "Hejme, Paĉjo koleras ĉiutage kontraŭ mi, pro tio ke mi, tute kontraŭvole, ofte faras stultaĵojn!" kaj ŝi aldonis : "Kiam li koleras, li eĉ publike vergas min!". Mi rigardis ŝin : Ĉu ŝi mokis min? Tute ne, ĉar ŝiaj okuloj pleniĝis je larmoj, dum ŝi elvokis tion; silente, ŝi ekploris.

Kortuŝite, mi konsolis ŝin kaj, post kelkaj minutoj, ŝi rigardis min, balbutante : "Neniam mi forgesos vin, sinjoro ; estu certa pri tio!". Kaj ŝi aldonis : "Plaĉus al mi, ke vi estu mia Paĉjo!"

Dum sia tuta restado, ŝi restis kun mi. La tago de l' foriro finfine alvenis kaj, kun la vizaĝo tute malseka je larmoj, ŝi adiaŭis min.

Infano mia, la adreso, kiun ci donis al mi tute ne taŭgas! Tamen, mi dezirus korespondi kun ci, kaj mi provos havi cian veran adreson, ĉar mi estas certa pri tio : Ci bezonas helpon, kaj mi povas cin helpi. Do, ĝis tre baldaŭ, karulino mia!

## PERNATURA NUTRADO

Naturista vivo, tio estas afero, kiun mi bone konas, de antaŭ longaj jaroj : vivi nude sub sunaj radioj, proksime de malvarmeta akvo - mi ne multe ŝatas tro malvarman - kaj tio en libertempa periodo ; ankaŭ multaj samideanoj konas tion ! Sed ĉi-jare, kiel prepensulo, mi havas "grandajn libertempojn", kiujn mi devas organizi por multe profiti de tia nova vivo, sen tro forlasi mian edzinon, kiu komencis labori ĝuste en tiu periodo, de antaŭ ses monatoj. Do, mi ĉeestis lastsemajne faktempon pri "pernatura nutrado" (franc-lingve t.e. "stage de survie").

Tio okazis en sudfranca farmdomo, nur dum kvin tagoj (mi povus elekti alian pli longan formulon de dusemajna faktempo, sed mi devas konfesi, ke, nekonante la aferon, mi pli ŝatis la mallongan). Dum la du unuaj tagoj nia instruanto konigis al ni la manĝeblajn herbojn, kiujn ni povos rikolti por nutriĝi : Abomeninde! tiuj estas ĉiuj herbaĉoj, kiujn oni trovas en malzorgataj ĝardenoj ! Feliĉe la zorgemaj ĝardenistoj senĉese uzas grandkvante herbicidojn kaj pesticidojn por elimini ĉiujn tiujn herbaĉojn ! Sed, ĉu vere oni povas manĝi ĉiujn tiajn herbojn ? Nia instruanto sciigis nin, ke tiuj herboj estis kultivataj en la ĝardenoj de niaj avoj antaŭ kelkaj jarcentoj, antaŭ ol oni enkondukis en la malnovan Eŭropon la novajn legomojn venantajn el Ameriko : tomatojn, terpomojn, kaj precipe spinacojn. Komence, nur la riĉaj nobeloj povis akiri tiel multekostajn nutraĵojn. Poste, la burĝoj sekvis ; kaj nun la proletoj kaj la malriĉuloj ne povus konsideri, ke ili povus manĝi tiel porbestajn herbaĉojn ! Kaj la kultivitaj legomoj fariĝis herbaĉoj, kiujn oni elĵetas.

Kiuj estas tiuj herboj ? Mi diros al vi kelkajn nomojn; sed ne ĉiuj el vi scios, kiuj estas la vegetaĵoj tiel nomitaj. Se vi estas interesataj, mi povos en sekva letero doni kelkajn pliajn informojn pri la plantoj. Tiuj vegetaloj estas jenaj :

- lapo (Lappa communis : F - bardane commune)
- amaranto postflekso (Amarantus retroflexus : F - Amarante réfléchie)
- malvo arbara (Malva silvestris : F - Mauve silvestre)
- kenopodo blanka (Chenopodium album : F - Chénopode blanc)
- ktp.

De tiuj plantoj oni manĝas laŭokaze la foliojn aŭ/kaj la stangojn aŭ/kaj la radikojn. Certe, oni devas bone koni tiujn plantojn kaj kiun parton oni povas manĝi! Kelkfoje la fruktoj estas manĝeblaj nur kiam maturaj, aŭ kiam kuiritaj. Kelkaj plantoj eĉ estas venenaj.

Post du tagoj da lernado, ni formarsiĝis, portante niajn dorsosakojn kun la necesaj objektoj : nur dormsako kaj akvoboteleto. Por la tuta grupo oni portis nur unu kaserolon kun malmulte da faruno, malmulte da oleo kaj salo : tri tagoj ne estos sufiĉaj por fabriki tiel malsimplajn objektojn ; sed pri kuleroj, forketoj, buŝtukoj : nenio ! Nur kelkaj povis preni poŝtrancilojn. Ni fabrikos manĝvergetojn same kiel la ĉinoj aŭ japanoj.

Mi devas ankaŭ konfesi, ke ni kunportis alumetojn: ĉar lerni kiel ekbruligi fajron estas tro longa afero, sen tiaj malgrandaj pecetoj !

Dum marŝado, ni kolektis multajn plantojn : radikojn, foliojn, stangojn, fungojn, ktp. Dekdu aŭ dektri kilometroj donis al ni bonan apetiton, kaj rapide oni dispecigis la fungojn. Ĉu vi scias, ke lolo, tiu planto, kiun oni elĵetas "el la bona greno", laŭ Evangelio, estas la "ray-grass", kiun oni uzas en la herbetejo por hodiaŭ nutri la ŝafojn kaj aliajn brutarojn ? Oni ankaŭ apartigis la diversajn plantojn ; samtempe kelkaj el ni kolektis lignajn pecojn kaj ekbruligis fajron.

Post agrabla banado, nedubeble nudaj en la rivero, ni manĝis per niaj manĝvergetoj, kaj la dektri kunmanĝantoj multe ŝatmanĝis la diversajn kuiritaĵojn : supon, fungojn, salaton kaj tizanon.

La sekvanta tago estis por viziti la ĉirkaŭajn interesajn lokojn : minejon, arbaron, kaj nedubeble, ni denove baniĝis. Nur unu manĝo en tago estas konsentebla, se oni bone manĝas dum tiu manĝo : tio estis farita. Ni lernis kiel fari "ĉapetojn" : tio estas meksikaj platkukoj, faritaj el faruno kaj pistitaj legomoj (folioj de tilio, leontodo, ktp); kaj aliaj pasteĉoj kompletigis tion kun supo kaj salato, ĉiam finita per tizano.

Mi forgesis diri, ke dum la promenadoj, ni ofte trovis ĉiuspecajn sovaĝajn fruktojn : pirojn, pomojn, morusojn, ktp. Tio facile ebligis atendi ĝis la vespera manĝo.

Dum la tria tago oni revenis ĝis la farmdomo, dektri aliajn kilometrojn, per malsama vojo. La vespera manĝo en la farmo estis bone ŝatata, sed ne tro plibona

ol tiuj, kiujn ni havis dum nia irado.

Kion diri pri tiela eksperimento ? Estis tre agrabla vivi tiamaniere tra Naturo, ekvidi tiajn nutraĵojn. Kaj multe da pli longaj aliaj spertoj oni devas fari poste, kiam ni revenas hejmen ; kaj ankoraŭ lerni plantojn : tiuj plantoj estas ofte medicinaj, kaj manĝi ilin estas samtempe kuracado. Mi jam havis "viruson" pri botaniko kaj oficinaj plantoj. Nun mi havos duan: manĝeblaj sovaĝaj plantoj !

Se vi deziras fari saman eksperimenton, venontjare, skribu al jena adreso : Ecologie et Artisanat, F 04100 MANOSQUE. Tel: (92) 72.40.24.

Ankaŭ en la sama loko, mi povas informi vin, ni havos en 1984 faktempon pri Esperanto !

Paŭlo.

### ĈU MONDO SEN MONO ... ESTAS EBLA ?

Mi bezonis duonmilionon da francaj frankoj por konstrui mian eksterurban dometon. Por tio mi iris al banko, por pruntepreni la monon.

Nu, post kelka atendo, mi estis akceptita de malgranda sed tre grava bankestro. Mi eksplikis mian zorgon... kun pruvoj sur tablo. Li respondis, ke neniu **banko** posedas propran monon, sed povas nur garantiĝi la pruntitan sumon da mono, kaj ĉi tio nur, se mi **antaŭe** pagos al ĝia kaso la kvinonon de la pruntebla sumo.

Do mi devis alporti **miajn** centmilojn da francaj frankoj el ververa mono. Tion mi faris kaj post kelkaj tagoj - post severa kontrolado de miaj pruvoj, kaj ke mi estas honorinda kaj bonvola kliento - mi ricevis fine **ĉekon** por ĉi tiu sumo... sed ne monon.

Por mi, la ĉeko estis "la mono", ĉar mi iris al arkitekto por doni grandparton el mia **ĉeko** por tiu farena konstruaĵo.

La laboro komenciĝis, progresis, kaj finiĝis.

La arkitekto pagis **per ĉekoj** la estrojn de la masonisto, lignisto kaj ĉiujn aliajn estrojn. La laboristoj mem ricevis de siaj estroj **ĉekojn** por siaj laboraĵoj.

La laboristoj devis **tuj** alporti aŭ sendi siajn **ĉekojn** al siaj bankoj por pagi siajn elspezojn per blua karto (kreditkarto), per kiu ili aĉetis en ĉiovendejo preskaŭ ĉion, kion la laboristoj ĉiutage bezonas.

La ĉiovendejo pagas siajn varojn **per ĉekoj** al siaj liveristoj, ktp. Kaj la vivo plu daŭras tiamaniere... (libere e-igita laŭ "LES YEUX OUVERTS", de S-ino Duboin, eld.1983. fare de M. Trenner)

## PRI LA MORTO DE LA UNUA "ESPERANTO-OAZO"

Antaŭ tri jaroj, kiam ekestis la "Esperanto-Oazo", mi ne povis imagi, ke ĝia vivo estos tiom mallonga. Tamen, estas nun fakto, ke ĝi - en la nuna loko kaj sub la nunaj kondiĉoj - mortas ĉi-jare.

La nomo oazo estis dusence elektita, lingve kaj naturamike, ĉar mi intencis krei ne nur lingvan sed ankaŭ belan naturan hejmon por esperantistoj.

Unue mi pensis konstrui dometaron kiel malgrandan kernon de estonta Esperantio: dekon da bangaloj por lui; ĉefan domon kun biblioteko, lernoĉambro, dormoĉambroj, manĝejo, trinkejo; naĝejon kun sunvarmigita akvo, kaj parceloj por kampadi. Pro manko de financa kaj alispeca kunlaboro, mi estis devigata malgrandigi la projekton - ĝis nun kampadejo - kaj realigi ĝin tute sola. Ĉiujare mi havis la esperon krei grupeton da diversnaciaj samideanoj, kiuj pli-malpli konstante restus ĉe mi kaj kunlaborus por la bona evoluo, plibonigo kaj pligrandigo de la entrepreno. Bedaŭrinde mi ne sukcesis atingi tiun celon kaj nun ne plu povas elteni la situacion.

Ankaŭ iom pli ol tri jaroj restas nur ĝis la centjara datreveno de Esperanto, kaj ni ne sukcesis havi eĉ unu Esperantan vilaĝeton. Mi konscias pri la graveco de nia lingvo por la tuta homaro kaj ne rezignas resti pasiva. Tial, mi intencas denove konstrui novan "oazon", por kio mi nepre bezonas samideanan kunlaboron, ĉar la tasko estas tro grava kaj granda por lasi ĝin dependi de nur unu persono. La kunlaboro povas konsisti el ideoj kaj sugestoj ĝis rekta financa kaj manlabora helpo.

Por nova loko mi pensas pri regiono proksima al la centraj Pireneoj, sude de la franca landlimo, ekzemple pri la urbo Jaca (ĥaka) en la hispana provinco Huesca (ueska). Oni povus konstrui publikan kampadejon kun la nomo "E-Oazo", oni povus asociiĝi al jam ekzistanta kampadejo, aŭ al naturamika asocio, aŭ prefere kaj pli bele, se la kunlaboro estus sufiĉe granda, oni povus konstrui la Esperantan dometaron, kiun mi unue planis.

Per tiu ĉi artikolo mi deziras iniciati debaton kaj vokas ĉiujn ideohavantojn, ekde novbakitaj junaj samideanoj ĝis emeritoj : skribu pri tiu ĉi temo al la E-gazetoj aŭ al mi mem\*, por ke ni povu havi baldaŭ la unuan Esperantion.

Mi dankas ĉiujn, kiuj apogis la nunan E-Oazon, kaj esperas, ke ne nur ili helpos la novan projekton. La helpontojn mi petas konsideri la komercan aspekton de la entrepreno kiel necesan elementon sed tute ne kiel ĉefan celon.

→

\* Akiles SANZ, Apartado 171, GANDIA (Valencia) Hispanio.

## MURRAY BOOKCHIN :

### MI NASKIĜIS EN LA REVOLUCIEMA MOVADO

(En siaj libroj - vd. "Por ekologia socio", ĵus eldonita de SAT-Broŝurservo - Murray Bookchin unuigas anarkiismon kun ekologio. Li skribas pri socio, kie la ekvilibro inter naturo kaj homo estas re-establita, kie la teknologio adaptiĝis al homo kaj naturo. En la ĉi-sekva mem-portreto publikigita en la sveda anarki-sindikata gazeto "Arbetaren" (La Laboristo) n-ro 47/1982, li rakontas pri sia vivo kiel radikalulo en Usono ; de revoluciema sindikata batalanto al eko-anarkiemulo.)

Mi "litere" naskiĝis en la revoluciema movado. Miaj geavoj (patrin-gepatroj) estis membroj en la rusa revoluciema partio, kiu altgrade estis influata de Bakunin (tamen ne rekte).

Post la revolucio 1905, kiam la kontraŭrevolucia punkto kovris la landon, miaj patrino kaj avino devis forlasi Rusion. Ili lokis sin en New York, kie ili tuj aniĝis al la "Klubo de la rusaj laboristoj", kie oni povis nombri multajn anarkiemulojn. Mia patrino, kiu estis laboristino, aniĝis al la revoluciema sindikato I.W.W. dum ĝia plej drama periodo. Mi naskiĝis en 1921 en New York. Tuta mondo da revoluciemaj ideoj kaj multaj politikaj rifuĝintoj, precipe rusoj, agadis en tiu medio, en kiu mi vidis unuafoje la tagan lumon.

Kiam mi estis naŭjara, mi aniĝis al la "Junaj pioniroj". Tie mi lernis ĉion pri marksismo, la historio de la socialismo, la revolucioj, la laborista movado, ktp. Spite, ke mia konceptado estis limigita, mi tre klare memoras pri tiu periodo (la granda depresio, la apero de la germana faŝismo, la homvicoj antaŭ la bakejoj, la strikoj, kaj iom poste, 1934, la ribelo de la vienaj laboristoj kaj tiu de la minejlaboristoj en Asturio) samklare kiel mi memoras pri la milito en Vjetnamio aŭ pri majo 1968 en Francio.

(daŭrigo p.30)

\*\*\*\*\*

Malgraŭ grandegaj malfacilaĵoj kaj seniluziigo pro la malsukceso de la unua kampadejo, mi ekkonis tre bonajn samideanojn, ĝuis tre belajn internaciajn etosojn kaj faris jenan gravan konstaton: la procento de bonvolaj kaj helpemaj homoj inter la e-istoj estas multe pli alta ol la ĝenerala procento. Se la nombro de gastoj estus estinta tiel alta kiel ilia kvalito, la entrepreno estus nun granda sukceso. Tiu konstato nutras mian esperon vivi baldaŭ en Esperantio.

La jaroj '30 estis la kulmino de la laborista movado kaj en Eŭropo kaj en Usono. La grandaj strikoj, kiuj estis enkondukitaj per okupadoj de fabrikoj en Parizo 1935, sekviĝis de la usonaj gelaboristoj. La novaj sindikatoj de CIO disvastiĝis al la tuta lando. Sangaj konfliktoj estis devige okazigataj antaŭ ol la laboristoj en la ŝtalindustrio, la aŭtoindustrio, la minejoj, en la transportentreprenoj kaj la teksfabrikoj havis la eblon organizi sin sindikate.

Kaŭze ke miaj gepatroj estis tre malriĉaj, mi tre frue devis komenci labori, unue kiel gazetvendisto, poste en la grandaj fabrikoj de New Jersey. Estis tie en feruzino, kie mi komencis interesiĝi pri la sindikata agado. Unue mi estis laboreja peranto (shop steward), poste sekretario kaj organizanto. Pli malfrue, post tempo en la armeo, mi iĝis aŭto-laboristo. Je tiu tempo estis U.A.W. (la unuigitaj aŭto-laboristoj) ankoraŭ la plej batalanta kaj plej demokrata sindikato, kaj mi eĉ volus diri, la plej revolucieca post I.W.W.

Pluraj aferoj tamen profunde influis al mia vivo. Dum la jaroj 1935-36 la Komunista Internacio forlasis sian pozicion kiel ekstrema maldekstro, favoranta revolucion batalon, kaj prenis pozicion reformisman, kiu rezultigis kompromison kun la burĝoj (la popolfrento).

Mi forlasis portempe la komunistojn, sed la hispana revolucio rekondukis min al ili, ĉar mi ne sukcesis trovi organizaĵon, per kiu mi povus helpi Hispanion.

Mi rompis la partian disciplinon kaj iris por aŭskulti al Norman Thomas, la gvidanto por la usona socialista partio, kiu donis raporton pri sia vizito en Hispanio. La komunistaj intrigoj en tiu lando skuis min, mi estis dekseksjara kaj ankoraŭ tre naiva. Kaj la Moskvo-procesoj ruinigis tute la konfidon, kiun mi havis por la komunistoj. En la mezo de la jaroj '40 mi ĉesis esti adepto de Lenin. Dum la tempo pasis, mi alprenis pozicion kaj starpunkton de libera socialisto kaj en la komenco de la jaroj '50 anarkiemulan. Mi kredas, ke la hungara revolucio 1956 rezultigis, ke mi fine anarkiemuliĝis.

Kiel dirite, kio plenumigis mian politikan instruigon, tio estis la malprogreso de la laborista movado en Usono. Mi dum dek jaroj agadis en la peza industrio kiel aktiva sindikata revoluciemulo en la tiutempa

plej radikala kaj aktiva organizaĵo : U.A.W. Antaŭ ol ĝi ruiniĝis de la burokratoj 1947-48, mi partoprenis en la striko ĉe "General Motors", kiu daŭris kelkajn monatojn.

Kiam ni estis gajnintaj la strikon kaj reiris al la laboro, mi konsciiĝis, ke tutplena ŝanĝo ekestis kaj en la organizaĵo kaj inter la laboristoj. Ekde tiam la sindikata movado estis akceptata de la burĝaro, la laboristoj estis perdintaj sian revoluciecan ardon kaj nur interesiĝis pri materiismaj avantaĝoj. Estiĝis malarmada spirita sinteno.

Subite mi komprenis, ke la hispana revolucio estis la kulmino kaj samtempe la fino de la centjara laborista revoluciemema historio. Mi komencis ree trastudi la historion de la laborista movado ekde junio 1848 ĝis julio 1936. De kiam mi forlasis la sindikatan movadon (kiu laŭ revolucieca vidpunkto nun estas tute al morto kondamnita), mi altiriĝis al la kontraŭnuklea movado, kaj mi de tiam estas tre interesata pri ĉio, kio temas pri ekologio. Mi komencis studi ankaŭ la rolon de la hierarkio, kaj mi konvinkiĝis, ke la revolucio devas esti efektiva ĉie. En la kuirejo, en la dormĉambro, en la individua kampo, kaj ne nur en la fabrikoj.

Fine, en mia serĉado pri alternativo al la sindikata movado, mi komencis studi la anarki-komunismon, kiel la rekta demokratio funkciis kvartala- aŭ urb-nivele en la antikva Ateno, en la mezepokaj komunumoj, en la sekcioj de la revolucieca Parizo 1793, en la arigoj de civitanoj en New England, en la Pariza Komunio. Mi komparis ilin kun la laboristaj konsilioj, kaj kun la sindikataj organiz-formoj, kaj mi dediĉis apartan atenton pri kian signifon la fabrik-hierarkio havas, kaj kiel ĝi influas la mensojn de la gelaboristoj.

Kiam la kontraŭ-kulturo komencis forlasi la urbojn, mi ekloĝis en Vermont, verŝajne la plej libereca loko en New England. Tie mi fondis la "Instituton por socia ekologio", kaj mi provis tie enkonduki kaj iom praktiki tion, kion mi skribis pri ekologio.

Mi ankaŭ instruas - sub granda libereco - ĉe kolegio en New Jersey, kie multaj el miaj lernantoj estas gelaboristoj. Mi plu havas kontaktojn kun la laborista movado, sed bedaŭrinde nek nova argumento nek io nova okazis, kiu devus ŝanĝi mian opinion pri ĝi.



Pro tio, ke mi multe vojaĝas tra tuta Usono, mi ricevas bonan enrigardon pri kio okazas ĉi tie. Multo, kion mi vidis en Usono, kontraŭas evidente, kion la eŭropa gazetaro prezentas. Al miaj eŭropaj gek-doĵ mi volas diri, ke la usona popolo ne estas survoje al "glitado dekstren". Spite la elekton favore al Reagan, ekzistas en la popolo profunda malkontento. Ekzistas nun komenco al movado kontraŭmilitisma kaj nova socia radikalismo kun disbranĉiĝoj al ekologio, feminismo, kvartal-movadoj en la urboj. La usonanoj estas laŭ siaj naturaj instinktoj "liberecanoj". Dum la tuta socia tradicio en Usono ekde la revolucio ĝis niaj tagoj ili alte taksis la individuajn rajtojn, la personan sendependecon, la malcentrigojn, kaj ĉiam ekzistis evidenta malamo al la ŝtato.

La usonanoj kredas multe je la individua aŭtonomeco, ili kredas, mallonge dirite, ke ju malpli da regado, des pli bone. Ankaŭ la plej ordinara opinio pri propraĵo estas interesa; por multaj homoj estas grava la propraĵo, ne pro tio ke ĝi riĉigas ilin, sed pro tio ke ĝi sekurigas ilian sendependecon, unue en la rilato al la ŝtato. Tial mi opinias, ke ekzistas forta tradicio de kontraŭ-aŭtoritateca karaktero en Usono. Dum jardekoj tiu libereca tradicio droniĝis pro importitaj formoj de socialismo.

La ideoj de la maldekstrularo prezentiĝis en lingvoj laŭ eŭropaj modeloj, kiujn la plejparto de la popolo ne komprenas. Nun ni devas prezenti niajn ideojn en la angla, kaj ne per la germana, itala, hebrea aŭ la rusa lingvoj, ne per marksismaj aŭ leninismaj terminaroj aŭ per uzado de pensoj de Maŭ Zedong aŭ Ho Chi Mingh. Ni devas alpreni nian propran tradicion - io, kion ĉiuj devus fari - kaj disvolvi ĝian revolucian entenaĵon.

Se mi lernis ion dum miaj jaroj pasintaj, estas unue, ke la mondo profunde ŝanĝiĝis post la historia epoko de la laborista movado, due ke la anarkiismo ne sole estas arigo de ideoj, fridiĝinta ideologio difinita unu fojon por ĉiam de siaj t.n. "fondintoj", sed antaŭ ĉio ĝi estas socia movado, kiu trovas sian nutraĵon el la reala vivagado de la popolo, kaj fine ni devas serĉi la radikojn de la anarkiismo en la specifaj tradicioj de la propra popolo.

Tiu strebado al la unikeco, la varieco kaj multflankeco →

## laŭtaj informoj kaj petoj

"MI PRETENDAS PANON" aŭ

Pri la nepre neceso posedi "KIEL DIRI?"

Se Hungaro diras al vi: "Mi pretendas panon", vi tuj rimarkos, ke li misuzas "pretendi". Sed ne li!

Se vi, Franco, diras: "La urbestro oferis honorvinon al la kongresanoj", tiu Hungaro same rimarkos, ke vi eraras. Sed ne vi!

Ktp, ktp... Estas konate, ke oni rimarkas la erarojn de la aliaj, sed ne siajn proprajn ("En fremda okulo...")

Esperanto riskus/as dialektiĝi, se ni ne estas TRE singardaj.

Ĝuste, **KIEL DIRI**? celas eviti tian dialektiĝon. 5000 esprimoj celas "krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn esprimojn por atingi fluan parolkapablon laŭ zamenhofa stilo."

Kial 2000 ekzempleroj rapide vendiĝis? Ĉar kiu vidas ĝin, konscias, ke ĝi nepre utilos al li. Jen kelkaj opinioj:

"Tre bona kaj utila" (G.W.) / "Bonega iniciato" (Sy., Belgio) / "Vera trezoro" (Th., Britio) / "Mi ĝin ofte konsultos" (L.M., Nederlando) / "Mi forte rekomendas la libron" (La Movado, Japanio), ktp, ktp.

Vi mem eble jam ĝin akiris. Bone, sed vi farus servon al viaj konatoj, se vi ĝin konigus al ili. Pli bone: se vi akirus kelkajn ekzemplerojn por viaj klubanoj, al kiuj vi facile povos ilin revendi.

Vi ne scias, kion sendi al viaj eksterlandaj amikoj okaze de Kristnasko. Ja, komisiu la broŝurservon sendi unu ekzempleron al li/ŝi.

\*\*\*\*\*  
40 gelernantoj 14- ĝis 17-jaraĝaj kaj 15 plenkreskuloj, komencantoj, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Skribu al Christian Nitsche, Kammerstr. 211, D - 4100 DUISBURG, FRG.

\*\*\*\*\*

Donacu al ni E-librojn kaj E-revuojn, kiujn vi ne plu uzos! Ni donos al ili utilon per pruntedono al niaj gelernantoj. Per tio VI HELPOS LA DISVASTIGON DE ESPERANTO. Argentina Esperanto-Lernejo, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario, ARGENTINO.

\*\*\*\*\*

estas por mi la plej alta formo de revolucieca internaciismo, ĉar ĝi lasas spacon por kultura, socia kaj historia kreivo, sed ne por tuteca samformigo.

MURRAY BOOKCHIN (trad. 30060)

MONDKOMERCA ELDONEJO ESPERANTISTA, P.O.Kesto 25041,

NL - 3001 HA Rotterdam, anoncas la starigon de la projekto "Esperanto-komputoro", kaj samtempe anoncas, ke la unua fazo de la projekto atingis jam kontentigan nivelon de plenumo. (Evidentigas tion raporto petebla al tiu Eldonejo).

La projekto havas la celon desegni, kunmeti, produkti kaj vendi komputorojn, programeblajn kaj funkciigeblajn en la internacia lingvo.

Jam evidentiĝas, ke tiu celo estos plej efike atingebla per pripenso de la tuto kiel serio de interdependaj fazoj. El tiuj, la fina fazo estos oferti al la publiko aparaton egale ampleksan kiel tiuj, nun ofertataj por uzado en mezgrandaj entreprenoj. Nepre frua fazo estos oferti aparaton, kiu, kvankam modesta en kapableco, tamen konservas latentan potencon por pliampleksiĝado. La desegnocelo de eĉ tia modestkapabla aparato estos ebligi manipuladon de tekstoj en la internacia lingvo, inkluzive de interaktivada programaro por ebligi al ne-Esperantisto rapide lerni la funkciigopaŝojn por la aparato en la lingvo de la aparato.

M.E.E. invitas nun sinproponojn de fakuloj pretaj kunlabori en la projekto, kaj samtempe invitas promesojn finance subteni la projekton, per, ekzemple, proponataj monpruntoj, aŭ per antaŭmendo de taŭga aparato por livero post efektivigo de la projekto. Pozitivaj reagoj al ambaŭ el tiuj ĉi invitoj estos gravaj por la realigo de la projekto. Aparte bonvenaj estus sinproponoj de kunlaboro el mondpartoj, en kiuj la nuna apogo de komputoroj sur la angla lingvo estas bremsa faktoro en la apliko de tiu ĉi moderna teknologio por la plibonigo de la vivsorto de la popolo. Jam eblas mencii kun granda danko proponojn de kunlaboro el Italio kaj Kanado.

La E-gazetaro estas petata doni kiel eble plej multe da subtena atento al tiu ĉi projekto.

---

**"STRANGA KATO"** estas la titolo de la kvara volumo de la verkaro de V. Eroŝenko, eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo. Tiu volumo arigas 8 pecojn verkitajn originale en la japana lingvo. Unu Eroŝenko mem esperantigis. La aliajn tradukis grupeto el japanaj samideanoj. La libreto estas 84-paĝa, bele presita, kiel kutime. Nuna prezo (kun afranko) : 38 FF. SAT-Broŝurservo volonte peras la mendojn.

---

la venonta numero aperos  
komence de januaro 1984  
intertempe, agrablajn jarfinajn festojn al ĉiuj!

## LAŬTAJ PETOJ KAJ INFORMOJ speciala aldono por Francio

**MONTAUBAN** Plu daŭras E-kursoj, gvidataj de :

- \* Carmen Honorius : - En la Universitato de la 3a aĝo (Ancien Collège) kun 6 geleĝantoj (Merkrede). Duagrada kurso (kun 3, Vendrede).
- \* Nicole D. : Unuagrada kurso en Foyer de Villebourbon (Merkrede, 18H/19H) kun 2 lernantoj.

### BORDOZO

\* La 6an de oktobro, en Bordoza, en kunvenejo "Aiglon", Henri Masson animis publikan debaton pri "Vers une communication transnationale". Li projekciis interesajn, belegajn movbildojn bone komentitajn. Malgraŭ multaj propagandaj rimedoj (afiŝoj, gazetaro, libera radio "100") nur proks. 40 personoj ĉeestis. Tamen 4 novaj gelernantoj partoprenis en la E-kurso.

\* Jen novaĵoj pri la peticio rilate al la leĝpropono n° 1550. Multnombraj subskribitaj peticioj alvenis al Bordoza, el diversaj departementoj, ankaŭ el Buxy kaj Nanterre, kie okazis la du ICEM-renkontiĝoj. Dankon al ĉiuj ! Miloj da subskriboj estis senditaj al S-ro Savary. La bretonaj gek-doĝ petis de ni daŭrigi la agadon. Ni tute konsentas pri tio. Do, bonan kuraĝon ! Ni laboru por sendi duan milon da subskriboj. Kaj kial ne la trian ?...

Tiu ĉi eksperimento montras al ni, ke E estas bone akceptata en multaj kaj diversaj medioj. Ĝi estas pozitiva rimedo por propagandi kaj disvastigi Esperanton.

Bonvolu sendi la subskribitajn peticiojn rekte al :

Ginette Gabillon, 32 rue Renault, 33200 BORDEAUX CAUDERAN  
(kaj ne al "L!" - red)

La Bordozaĵoj.

## RADIO ESPERANTO en PARIZO konfiskita de la ŝtato !!

Ekde la socialista registaro (10an de majo 1981), liberaj lokaj radioj (modula frekvenco) estis akceptitaj sen leĝekzisto. La parizaj E-istoj tuj kaptis eblecon informi pri kaj per Esperanto. Tiucele, ili kreis propran radion (Radio Esperanto), kiu kuniĝis kun tri aliaj (Radio Libertaire, Radio Libertaria kaj Radio Liberté).

Dezirante kontroli la lokajn radiojn, la ŝtato starigis leĝon la 10an de majo 1983, por permesi kelkajn radiojn kaj malpermesi la aliajn. En nia radigrupo, Radio Libertaire ricevis malpermeson, Radio Libertaria kaj Radio Liberté, poratendan leteron, sed Radio Esperanto nenion ricevis. Tiuj kvar radioj estas la originala voĉo de minoritatoj, tamen ili havas unu el la plej gravaj aŭskultantaroj en Parizo. Pro tio, konsentante la artikolon 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj akceptita de Francio en 1948, ni kune decidis daŭrigi la elsendojn

malgraŭ la malpermeso.

Dimanĉon la 28an de aŭgusto, policistoj perforte konfiskis la komunan materialon de la kvar radioj. Tiamaniere, registaro silentigis la ununuran voĉon de esperantistoj en Parizo.

Tamen, dum du jaroj, Radio Esperanto ricevis informojn kaj subtenojn el 30 landoj, 70 invititoj el 20 landoj pruvis ĉe nia mikrofono, ke Esperanto malaperigas lingvistajn barilojn. La naskiĝo de nia radio estis grava paŝo por malgrandigi la nesufiĉan informadon pri Esperanto en nia regiono. Tamen, la nunaj ministroj kaj François Mitterrand subskribis, kiam ili estis opoziciaj deputitoj, leĝproponon, kiu celas enkonduki instruadon de Esperanto en la lernejan programon. Promeso, nur promeso...

Per tiu konfisko la socialista registaro murdis la esprimrajton des pli grave, ke la dosiero de Radio Esperanto ricevis nenian respondon. Granda mona subteno de nia aŭskultantaro ebligis denove elsendi ekde la 5a de septembro 1983. Por ricevi rajton elsendi, ni bezonas subtenon. Se vi opinias, ke nia batalo por Esperanto valoras, bonvolu sendi al ni subtenajn leterojn kaj peticiojn, kiujn ni transdonos al ministro pri komunikado. Via helpo pruvus al la oficialaj instancoj, ke Esperanto estas internacia kulturlingvo.

La teamo de Radio Esperanto

Artikolo 19 de Homaj Rajtoj

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo ; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

## Pri la libro "VOS CHÂÎNES" de Docteur JACQUES

(Vidu L! 50, p. 35)

**Opinio de legitino :** "...Ĝi estas libro por junaj virinoj, por ilia seksa kaj erotika edukado ! Sed juna virino riskas naŭziĝi antaŭ ol atingi la ĉapitron "Des rêves sur Eve", post kiu ŝi riskas senkuraĝiĝi : ne ĉiuj kapablas tiom furioze erotiki ! Unu el la intereso de tiu ĉapitro estas, ke parolas ne seksologo, ne specialisto, sed ja praktikanto, kio tute ŝanĝas la ricevatajn impresojn. Sed ĉu tia erotiko ne estas signo de ia malekvilibro ? Eble ne ĉe D-ro J., forto de l'naturo, escepto, "uragano", kiel diras liaj proksimuloj.

Se la juna virino daŭrigos la legadon, ŝi estos ĝuste instruita pri la "stérilet" kaj pri "I.V.G." Mi bedaŭras, de D-ro Jacques ne klarigas kial, kiel efikas la pilolo. Kiel maljuna virino, mi povas aserti, ke li tute pravas, dirante ke abortigo laŭ la metodo Karmann estas sendanĝera. Antaŭ la apero de tiu metodo (per aspirado) la inicitoj ne-kuracistoj praktikis abortigojn ne per sondilo, kio estas tro danĝera, sed per intern-utera injekto ; se farita plejeble frue post la koncipiĝo,

→

kun strikta higieno, ĝi estis nedanĝera. La operacio estas zorge priskribita en "La question de population" de Hardy (kaŝnomo de Gabriel Giroud), nun netrovebla ; jam de longaj jaroj Jeanne Humbert vendis la lastan ekzempleron. Kaj la vera Karmann-metodo praktikata de D-ro Jacques estas ankoraŭ pli bona. Li ankaŭ pravas, avertante ke virino, kiu nepre ne volas naski, mensogas pri datoj, kaj estas preta ion ajn riski, eĉ sian vivon. Tio estas fakto kontraŭ kiu la uloj "apostolaj kaj romaj" povas absolute nenion. La kuracistoj mem povas instruiĝi el la sperto de D-ro J. Sed kial nenion diri pri vazektomio ?

Mi miras, ke sur iuj virinoj li praktikis plurajn I.V.G. eĉ, per escepto feliĉe! ĝis dek unu. Kial ne ilin instigi al antaŭŝirmado, kiu estas ja preferinda ol aborto eĉ perfekta.?

D-ro J. skribas, ke nuligo de la leĝo de 1920 estas ŝuldata al li, Françoise Giroud, Simone Veil kaj Giscard d'Estaing ! Ha! kiel nesciantaj, tiuj novaj generacioj ! Ili eĉ neniam aŭdis la nomojn de Paul Robin, Hardy, kaj pli proksime al ni Jeanne kaj Eugène Humbert, kiuj eldonis gazeton "La Grande Réforme", batalis dum la tuta vivo kontraŭ la "krimecaj leĝoj" de 1920. Ili diskonigis kontraŭkoncipilojn kaj la malpermesitan libron "La question de population". Jeanne tion pagis per du jaroj en la prizono St Lazare, post kio ŝi verkis "Le Pourrissoir" kaj tiu libro certe kontribuis al malaperigo de tiu abomena prizono por virinoj. Eugène Humbert estis enkarcerigita dum la milito en Amiens ; kelkajn tagojn antaŭ lia liberiĝo trafis la prizonon bombo, sub kiu li mortis. Antaŭ eble dudek jaroj Françoise Giroud aperigis en "L'Express" artikolon pri "konscia patriniĝo", en kiu ŝi parolis pri Doktorino Lagroua-Weil-Hallé. Mi skribis al F.G. por ŝin informi pri la agado de J. kaj E.H. Ŝi neniam respondis, kaj mia letero neniam aperis en "le courrier des lecteurs"... J. kaj E. H. estis anarkiemaj, amikoj de Sébastien Faure, Manuel Devaldès kaj multaj aliaj, kaj la silento-konspirado efikis... Jeanne Humbert, nun pli ol 90-jara, vivas en Parizo kaj ankoraŭ verkas por "Le Réfractaire". Oni legu ŝian belan libron "Eugène Humbert". Parolante pri batalo kontraŭ la leĝo de 1920, mi ne forgesu la fratojn Paul kaj Aristide Lapeyre.

Nu, se nia juna virino plu daŭrigos la legadon, ŝi lernos multe el la vivo kaj spertado de honesta kuracisto. Ŝi ekscios, kio estas la justico, kiel ĝi hontinde faligas kuraĝan homon.

D-ro J. havas strangan sintenon rilate la mortpunon, diskutindan opinion pri divorco, kaj laŭŝajne li estas malbone informita pri la danĝeroj de atomcentraloj. Laŭ mi, li tro kredas je la rajto de la granda nombro.

Pri ĉio, kio ne estas el lia kompetenteco kaj propra sperto, oni bone komprenu, ke li esprimas nur sian opinion, "intiman konvinkon", kaj ne informas pri scienca, kontrolita certeco..."

D.C.

## LA ĈI-JARA ZAMENHOF-TAGO EN AKVITANIO

okazos Dimanĉon 11an de decembro, ekde la 9a matene, en "Piquepoul", sidejo de "Escola Occitana d' Estiu", proksime de Villeneuve sur Lot (47). Vd. la mapeton! En la bele situanta renkontiĝejo troviĝas kunvensalono(j), dormejo (ĝis 40 lokoj), manĝejo... kaj tre gastamaj geokcitanoj, kio estas eble pleonasmo.

Bonvolu nepre sin anonci al C. Baudé, 47340 Laroque (tel.957503 aŭ 957128):

\* tiuj, kiuj alvenos sabaton kaj deziras tranokti en Piquepoul;


(Kunporti nur dormosakon aŭ littukojn. Prezo: 30FF kun matenmanĝo)

\* tiuj, kiuj partoprenos la dimanĉan, simplan, tagmanĝon (ĉ. 30FF).

Kiuj, malgraŭ la ĉi-suba bela mapeto, timas perdiĝi, tiuj elturniĝu por trovi la stacidomon de "Hautefage-Auradou", de tie ili facile trovos "Piquepoul" kaj ĝian okcitanan flagon.

Pro la venonta tutmonda SAT-kongreso en Bordoza la ĉi-jara Z-tago certe havos riĉan "tagordon". Venu multnombre !

Kiel atingi "Piquepoul" :



Les soussignés, convaincus

- qu'une langue universelle serait un facteur de compréhension et d'échange entre les personnes et les peuples,
- qu'une langue universelle permettrait de découvrir ou d'approfondir des cultures inconnues du fait de la barrière linguistique,

estiment que l'ESPERANTO - Langue Universelle bien enracinée dans plus de 80 pays - apporterait une solution satisfaisante aux problèmes de communication.

Ils souhaitent que l'ESPERANTO soit enseigné dans les Etablissements scolaires et universitaires.

Dans ce but, ils se déclarent prêts à soutenir toutes les initiatives prises par les associations espérantistes, afin qu'un Projet de loi conforme à l'esprit de la Proposition de loi n° 1550, soit présenté, dès que possible, à l'Assemblée Nationale.

NOMS	ADRESSES	SIGNATURES

## VIA SITUACIO

rilate al "Laŭte!"		rilate al SAT-Broŝurservo				
abono finita (ruĝa kruco) dato de via abonfino	<table border="1"> <tr><td style="text-align: center;">×</td></tr> <tr><td style="text-align: center;"> </td></tr> </table>	×		en via konto { <table border="1" style="display: inline-table; vertical-align: middle;"> <tr><td style="text-align: center;">restas</td></tr> <tr><td style="text-align: center;">mankas (-)</td></tr> </table>	restas	mankas (-)
×						
restas						
mankas (-)						

## SAT-BROŜURSERVO

### NOVAĴOJ

- \* **"Kiel diri...?"** estas denove disponebla, 148-paĝa, ofsetita. Nova prezo : 20 FF + afranko. Sed prefere mendu samtempe 5 ekzemplerojn, tiam la prezo falos al 16 FF kaj la afrankon vi ne pagos.
- \* **"Kio estas SAT ?"** , informbroŝureto de Henri Masson, fakte lia prelego en la Londona Esp.-Klubo en sept.'83. Prezo : 3 FF. SAT-rondoj, aktivuloj, nepre uzu tiun informmaterialon ! Prefere mendi samtempe minimume 30 ekz-erojn. Vi pagos nur la eldonkostojn (po 1 FF) + afrankon, t.e. :

- Por Francio  $30 + 13,10 = 43,10$  FF

- Ekster Francio :  $30 + 8 = 38$  FF.

Ekzistas ankaŭ 60-minuta kasedo, aĉetebla ĉe SAT-sidejo.

**ELĈERPIĜIS** depost majo 83, kiam aperis la broŝurlisto en L! 48 : AD, IA, KK, NR, PC, TE.

Krome, la eldonado de "Esp. por katalunoj" estas prokrastita.

Okaze de la jarfino vi povos do mendi ĉiujn aliajn tekstojn !

Sed nepre konsideru, ĉu vi ne emus de nun fariĝi regula ricevanto de ĉiuj novaĵoj kun 20%-rabato!!

**POR 1984**, jen kelkaj eroj el la provizora programo:

- \* **"UNUECO SUPER PROKREDA DIVIDIGO"** de Leo Polak, trad. F. Munniksma, jam pretita... 3 FF
- \* **"NATURLEĜO, PENSOLEĜO, MORALA LEĜO"** ankaŭ de Leo Polak (trad. F. Munniksma)
- \* **"LA RACIA KAJ ATEISTA BUDHISMO"** (nekonata aŭtoro, elfrancigita de T.F.)
- \* **"JARO 2000"** de Henri Muller, trad. Abundana Frakcio de SAT.
- \* kaj eble aliaj...

Kribo

WWWWWWW

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 LARQUE. CPPAP n° 58651